

HORIZONTO

IV-a JARO N-o 19 (1)
JANUARO - FEBRUARO 1979

RA KAJ INFORMA REVUO



ATENO: LA PARTHENON

2MO DE KONTRAŬNEŬTRALECA PRAKTIKO

B E L E T R O

ĈU EKZISTAS "NEDERLANDA" LINGVO?

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76

N.º 1 - Januaro - Februaro 1979

ENHAVO

LA STATUTPROJEKTO DE UEA:
KONFIRMO DE KONTRAŬNEŬTRALECA
PRAKTIKO (Ivo Lapenna)
LINGVA INCIDENTO EN LA EŬROPA
PARLAMENTO (Jean Thierry)
CU EKZISTAS «NEDERLANDA»
LINGVO? (Herman Deceuninck)
POR LA INTEGRIGO (Paul Neergaard)
LA AGRIKULTURO KAJ LA HORTIKUL-
TURO DE EŬROPO... Prelego (Oton
Pancer)
EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAJOJ
Internacia Jura Revuo (IJR)
BELETRO
Elegio por Mirinfano (Edwin de Kock)
Infanopreĝo (Edwin de Kock)
Turto kaj Kolombo (Edwin de Kock)
Tankao (Edwin de Kock)
CU VERE EKZISTAS LA MATEMATIKO
DE LA HISTORIO (G. Mora i Arana)
MALPROKSIME DE LA HEJMO (J. Ben-
Alter)
KIU ESTIS LA UNUA ESPERANTISTO
EN AMERIKO? (B. Golden)
ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)
Redaktas (Ivo Lapenna)
OMAGE
LIBROJ SUB LA LUPEO Recenzas
(S. Gumá)
TRALA ESPERANTO GAZETARO Redak-
tas (J. Thierry)
MALLONGE

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Ad-
ministracio: Inés Gastón, Paseo Marino
Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĝk.
Zaragoza 00428398 (Jarabono 500 ptoj.), au-
la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
GRAZ. Pĝk. Graz 1257.845. Jarabono:
160,— S.

Britujo:
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON
N13 4UL. Pĝk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:
Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610
RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 60,—
D Kr.

Finlando:
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101
KUOPIO 10, Pĝk KU 152801-5. Jarabono:
38,— F. Mk.

Francujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,
F-75018 PARIS. Pĝk. Paris 21.670.96 V.
Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:
Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5,
D-3000 HANNOVER 1. Pĝk. Hannover 120
854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:
Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omo-
nia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj
Drakmoj.

Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH
TIKVA. Pĝk. Bank Hadoar, 4-45854-8.
Jarabono: 84 izr. liroj.

Jugoslavio:
D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10,
YU-41000 ZAGREB.

Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO
Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— \$.

Luksemburgo:
Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L
OLM. Konto N.º 5603/6196-3, CEE (Caisse
d'Epargne de l'Etat). Jarabono: 380, luk-
semburgaj frankoj.

Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502
R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el
tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando
estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel
perantoj, bv. sin turni al la direktorino

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)

KONFIRMO DE KONTRAŬNEŬTRALECA PRAKTIKO

Fine, post kvar jaroj kaj duono, la organo de UEA publikigis la jam delonge promesitan projekton de la nova Statuto de UEA (*Esperanto*, decembro 1978, p-oj 213-218). Dum tiu periodo, nekredeble longa por plenumi tian relative simplan taskon, du plenajn jarojn (1974-1976) funkciis la Komisiono pri Statuto. Ĝi «faris amason da antaŭprepara laboro», kiel konvinke informas la redaktoro sur p. 210, sed ĝi estis malfondita dum la UK en Ateno, post kiam eĉ ĝia kvara statutskizo estis malakceptita kvazaŭe pro «kel-kaj pure 'moritaj' terminologiaj kaj difinoj», tiel ke eĉ «Moritz mem ne voĉdonis por siaj propraj proponoj», kiel same konvinke informis la sama *Esperanto* en n-ro 9/1974 sur p. 156. Tamen, tiu kvar fojojn rifuzita fuŝaĵo, por kiu eĉ la proponinto ne voĉdonis, «rezultigis la statutan materialon en tiu ĉi numero de la revuo», kiel plian fojon konvinke informas la organo de UEA sur p. 210. Nenio pli bone reflektas la ĝeneralan konfuzan karakteron de la statutprojekto, ol tiuj kontraŭdiraj asertoj celantaj kaŝi la veron kaj akompanataj, kiel kutime, per bombastaj senenhavaj vortoj, jam bone konataj al atentaj legantoj de *Esperanto*.

La fakto estas, ke, post la dissolvo de la Komisiono pri Statuto, la Estraro de UEA transprenis la taskon ellabori la statutprojekton, kiun ĝi nun, post pliaj du jaroj kaj duono, prezentas al la membraro per enkonduka artikolo de la prezidanto sub la titolo «Pro Neŝanĝemo ni Riskas Stagnon».

Principaj Demandoj Ligitaj al Falsita Citaĵo

Antaŭ ol pritrakti la ĉefajn erojn de la statutprojekto, precipe la redifinon de «neŭtraleco», kiu fakte konfirmas la malneŭtralecan karakteron de UEA ekde julio 1974, necesas koncize tuŝi 1-2 principajn demandojn en la artikolo de D-ro Tonkin.

Jam la titolo estas erariga kaj misgvida, ĉar ĝi implicas, ke la nuna Statuto obstaklas la progreson. Fakte, post la kunfandiĝo de IEL kaj UEA en 1947, kaj la akcepto de la nuna Statuto en 1948, modernigita en 1955 kaj 1956, UEA bonege kaj konstante progresis el ĉiuj vidpunktoj — inkluzive agadojn, financon bazon kaj membronombron — por atingi kulminon de forto kaj prestiĝo ĝuste antaŭ Hamburgo (1974) malgraŭ la intencaj sabotadoj precipe en la periodo 1971-1974. Oni legu aŭ relegu ĉap. 18 (p-oj 548-635) de *Esperanto en Perspektivo* (en la plua teksto *EeP*) por mem konstati tion, aŭ almenaŭ oni konsideru la takson donitan de tiel objektiva observanto, kiel D-ro P. Neergaard, kies artikolo (verkita en 1974) por la unua fojo komplete aperas en tiu ĉi numero de *Horizonto*. Nur post Hamburgo okazis ne «stagnon», sed grandega kaj ĉiufanka regreso, kiu reflektiĝas ankaŭ en la nekontestebla fakto, ke UEA perdis preskaŭ unu kvinonon de siaj individuaj membroj, inter kiuj tre multajn el la plej valoraj kaj aktivaj. Kaj tio okazis ne pro la Statuto, sed, tute male, *pro la krudaj malobservoj de la bazaj principoj kaj reguloj de la Statuto* kaj en Hamburgo kaj post ĝi. Tiujn malobservojn la nuna projekto celas ankaŭ formale statutigi, kiel eksplicite rekonite de D-ro Tonkin mem rilate la principon de neŭtraleco: «La prudento diktas — li skribas — ke ni estonte evitu la problemon per reformulo de la koncerna paragrafo de la Statuto, ne por ŝanĝi la praktikojn de UEA, sed por konformigi la Statuton, al la praktiko kaj tiel forigi tiujn problemoj de interpretado» (p. 210, nia substreko). Evidente, povas temi nur pri la hamburga kaj posthamburga «praktiko» de partipolitika malneŭtraleco, kiel abunde pruvite en *Hamburgo en Retrospektivo* (en la plua teksto *HeR*) kaj en la rubriko «Esploro kaj Dokumentado» (ED) de *Horizonto*, inkluzive tiun ĉi numeron.

Por apogi sian pledon D-ro Tonkin citas miajn vortojn el *EeP* (p. 560): «Rigore observante la reformulitan, vastan principon de neŭtraleco por UEA kiel tia, oni devis kompreneme rilati al kelkfojaj devojiĝoj en unuopaj landoj» kaj li metas punkton post «landoj». Fakte, tiamaniere citi signifas falsi, ĉar en la originalo post «landoj» troviĝas ne punkto, sed komo, kiun sekvas la esenca parto: «se tiuj devojiĝoj ne afekciis iel serioze la neŭtralecon de UEA kiel reprezentanto de la neŭtrala Esperanto-Movado». La samon mi ripetis en *HeR* (p. 22) kaj montris per konsiderinda nombro da ekzemplaj kazoj kiel la ĝishamburgaj Estraroj rigore atentis, ke la maksimume permeseblaj limoj de devojiĝoj ne estu transpasitaj, kaj kiel tiuj Estraroj malebligis la atencojn kontraŭ la neŭtralecon de la Asocio (v. p-ojn 23-24, 30-34, 43-49, k.a. de *HeR*). La parto de mia frazo, kiun D-ro Tonkin ellasis — evidente intence, ĉar li ne povis ne vidi la vortojn, kiuj sekvas post la komo — koncizege formulas la kvintesencon mem de la tuta krizo en la posthamburga UEA: per konspiraj kontraŭstatutaj manipuladoj oni ja sukcesis en Hamburgo forigi la ĉefajn obstaklojn al senlimaj kontraŭneŭtralecaj, partipolitikaj agadoj en la kadro de UEA, kiel ĉiu objektiva observanto povas mem konstati, sed oni ne sukcesis kaj neniam sukcesos silentigi la tradician partipolitike neŭtralan esperantismon, ankoraŭ malpli mortigi ĝin. Saĝaj konspirintoj kaj iliaj konsciaj aŭ nekonsciaj helpantoj estus devintaj antaŭvidi tion, des pli, ke ili estis klare atentigitaj en la ĉefartikolo publikigita en la aprila numero de *Esperanto*, 1974. En sia miopeco ili bedaŭrinde nek mem antaŭvidis, nek observis la plej seriozan admonon.

Ankoraŭ io: en la socio, same kiel en la naturo, kvantaj amasiĝoj, ofte nerimarkeblaj, transformas unu kvaliton en alian. Akvo restas akvo eĉ se la kvanto de ĝia temperaturo malaltiĝas al 20, 10 eĉ nur al 1 centigrado, sed ĝi transformiĝas en glacieron, se la temperaturo atingas nulon kaj subnulon. Adekvate: unu afero estas sporadaj kaj neesencaj devojiĝoj de la principo de la statute difinita neŭtraleco *interne* de unuopaj landaj asocioj (ekzemple, laŭdado de la politika sistemo en sia lando, sende de saluttelegramo al la ĉefo de la propra registaro, diservo en oficiala programo de landa Esperanto-kongreso, k.s. depende de la kutimoj en la koncerna lando); tute alia afero estas sistema partipolitika propagando kaj ĉiaspekaj partipolitikaj agadoj en UEA mem, inspiritaj aŭ ordonitaj de partipolitikaj faktoroj ekster UEA kaj ekster la Esperanto-Movado entute (ekzemple sistemaj atakoj kontraŭ la «usonan imperialismon», «kapitalistan militpolitikon», «israelan agreson» k.s., aŭ nomumado de la delegitoj de UEA fare de la sola politika partio kaj ilia registrigo ĉe la politika polico, donado de striktaj kaj devigaj instrukcioj al sialandaj delegitoj kaj komitatanoj de UEA kiel voĉdoni en la elektoj kaj en la Komitato de la Asocio, partoprenado en persekutoj kaj en politikaj procesoj kontraŭ honestajn kaj sindonajn esperantistojn, ktp., ktp., kiel pruvite per originalaj dokumentoj, eĉ per sonbendoj kaj filmoj). La ĝishamburgaj sporadaj kaj neesencaj devojiĝoj restis en la kadro de la statute difinita neŭtraleco de UEA aŭ, por bilde ilustri per la supra ekzemplo, plu konservis la kvaliton de «akvo»; la sistema kaj senbrida partipolitika agado en la nuna UEA fare de grandaj partoj de la Asocio, sen kia ajn rezisto fare de la Estraro kaj Komitato de tiu Asocio, abunde transpasis la maksimume permeseblajn limojn de la statuta neŭtraleco kaj transformis ĝin en malneŭtralecon, en «glacian rokon» multajn gradojn sub nulo. Nur personoj, kiuj ne distingas inter akvo kaj glacio, ankaŭ ne distingas inter la ĝishamburga rigora observado de la neŭtraleco de UEA kaj la nuna kontraŭstatuta malneŭtraleca praktiko.

Utilas aldoni, ke dum la UK en Londono (1971) okazis profunda kaj ampleksa debato pri la demando ĉu la koncepto de neŭtraleco de UEA estas adekvata. Fine de longa diskuto okazis voĉdono, kiu montris, «ke la grandega plimulto de la ĉeestantoj (verŝajne ĉ. 500 personoj kontraŭ nur 7) trovis, ke la nuna koncepto de neŭtraleco, kiel formulita en la Statuto kaj aplikata en la praktiko, estas adekvata kaj konforma al la bezonoj de la Asocio en la nuntempaj kondiĉoj» (*EeP*, p. 561). Ankaŭ tiun gravan faktoron D-ro Tonkin ne menciis per unusola vorto. Kio, do, ŝanĝiĝis en la «nuntempaj kondiĉoj» inter 1971 kaj 1974? Nenio, se oni esceptas ne la verajn bezonojn de UEA, sed la bezonojn de la partipolitikaj elementoj en UEA kaj la interesojn de la konataj unupartiaj faktoroj ekster UEA.

Se, malgraŭ la supraj ĝustaj konstatoj, la Asocio estus fakte progresinta ekde Hamburgo; se de ĉiuj flankoj ŝprucus novaj, utilaj ideoj kaj se la gvidantaro de UEA laŭplane realigadus ilin; se ĉio-ĉi speguliĝus en amasa alfluo de novaj individuaj membroj; se, se, se..., mi estus la unua, kiu rekonus, ke la hamburgaj kontraŭstatutaj eventoj, kvankam principe kondamnindaj, tamen finfine donis bonajn rezultojn, kaj mi agus konforme. Sed okazis la inverso sur ĉiuj linioj. Praktiko, kiu perdigas al la Asocio kvinonon de la kerna, individua membraro, postulas ne ŝanĝon de la esenca principo de la Statuto, sed *ŝanĝon de la profunde erara praktiko por revenigi la Asocion al observado de tiu baza principo de partipolitika neŭtraleco, kiun klare formulas la Statuto.*

Eraroj pri Faktoj

En la artikolo de D-ro Tonkin troviĝas ankaŭ pluraj eraroj pri faktoj. Li asertas, ke en 1936 estis fondita Internacia Esperanto-Ligo «apude (kaj opozicie) al UEA» kaj ke ĝi fariĝis «organizaĵo de landaj asocioj». Fakte, IEL estis fondita pro kaŭzoj analizitaj en *EeP* (p-oj 439-442) kaj ĝi estis organizaĵo de landaj asocioj kaj individuaj membroj kun forta delegita reto. Post la kunfandiĝo de 1947, la nova, postmilita UEA ne «heredis la delegitan reton de la malnova UEA», kiel asertite en la artikolo, sed de IEL kun nur kelkaj delegitoj de la ĝeneva UEA, apenaŭ vegetanta. La streĉitecoj en la rilatoj inter TEJO kaj UEA neniel okazis «ĉefe pro disputoj pri decidopovo», kiel asertas la iama prezidanto de TEJO, sed pro krudaj malobservoj de la Statutoj kaj de TEJO kaj de UEA fare de la Estraro de TEJO ekde 1969, kiel bone konate al D-ro Tonkin kaj dokumentite en ĉap. 4 de *HeR* (p-oj 35-49) kaj aliloke. Estas vero, ke TEJO ne estis menciita en la Statuto de UEA kiel junulara sekcio de la Asocio, ĉar en la nuna formo TEJO estis fondita nur en 1957, dum la lastaj revizioj de la Statuto de UEA okazis en 1955 kaj 1956 (p-oj 590-591 de *EeP*). Tamen, estas demagogie nekorekte publikigi foton de kelkaj gejunuloj sidantaj sur herbejo kaj kun komento: «Ne plu sur herbejo: la projekto de la nova Statuto antaŭvidas klaran lokon de TEJO en la strukturo de UEA» (p. 212 de la decembra *Esperanto*), ĉar laŭ la Statuto de TEJO, aprobita de la Komitato de UEA en Marseille (1957), TEJO ja «estas la Junulara Sekcio de UEA» (art. 2), kaj efektive ekde 1957 ĝis Hamburgo TEJO ĉiam estis tre forte, fakte eksterproporcie forte, reprezentita en la Komitato kaj Estraro de UEA, interalie pere de la siatempaj membroj kaj funkciuloj de TEJO H. Tonkin mem, G. Becker (poste ĝenerala sekretario de UEA), U. Lins, U. Moritz, C. Minnaja, N. Minnaja, I. Osibov, ktp., dum D-ro V. Sadler fariĝis direktoro de la CO longe antaŭ Hamburgo. Krome, la membroj de TEJO kaj TEJO mem ĝuis multajn avantaĝojn kaj privilegiojn.

Tiaj eraroj pri historiaj faktoj — intencaj aŭ neintencaj — devus ne troviĝi en artikolo de prezidanto kaj en organo de serioza organizaĵo entute, precipe ne en numero rilatanta al tiel grava afero, kiel propono pri radikalaj ŝanĝoj en la Statuto.

Rimarkoj pri la Ĉefaj Ŝanĝoj

Tuta numero de *Horizonto* apenaŭ sufiĉas por analizi iom detale ĉiujn ŝanĝojn entenatajn en la statutprojekto. Ĉi tie ni limigas nin nur al la ĉefaj.

Celoj kaj rimedoj: La nuna Statuto jam distingas inter la celoj kaj rimedoj de UEA (art. 3, v. ankaŭ p-ojn 580-584 de *EeP*). Se oni nepre volis eĉ pli reliefigi la distingon, oni povis tion fari en du apartaj artikoloj, kiel proponite en art. 3 kaj 4 de la projekto, sed oni povis ankaŭ lasi la nunan teknikan strukturon de unusola artikolo, ĉar la celoj kaj rimedoj ja estas du partoj de la sama tuto. Pli grava estas la ellaso de la celo (a) «disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto» el inter la celoj de la Asocio. Kial? Ĉu fakte la nuna UEA ne plu celas disvastigi la lingvon? Nenio malhelpis la eventualan aldonon de kelkaj precizigaj vortoj al la celo (a), ekz. «kaj agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj», sen kia ajn plia aldono, ĉar «faciligi la internacian komunikadon...» estas inkluzivita en la celo (b) «faciligi ĉiuspecajn spiritaĵojn kaj materiajn rilatojn...» Art. 4 de la projekto (rimedoj) estas formulita ege manke kaj mallerte. En Statuto, kiu estas siaspeca jura dokumento, oni ne povas komenci la listigon de la rimedoj per «interalie». Krome, kial estas ellasita la punkto (i) de art. 3 de la Statuto? Ĉu UEA ne plu intencas kreskigi inter siaj membroj senton de solidareco; ĉu ĝi ne plu intencas disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj? La ellaso de la lasta alineo de tiu artikolo de la Statuto pri akiro de proprietaĵoj kaj elekto de kuratoroj povas esti danĝere neoportuna el jura vidpunkto laŭ la leĝoj de pluraj landoj. Pretere dirite, same danĝera estas la ellaso de la dua alineo de art. 9 de la Statuto, laŭ kiu UEA malakceptas ĉiun financon respondecon pri la funkciado de la servoj. Nuntempe, kiam ĉie en la mondo vastiĝas la apliko de la principo de senkulpa jura respondeco pro damaĝoj, tiu klaŭzo nepre devis esti konservita. Same tiel devis esti konservita la preskribo, ke la Statuto kaj regularoj estas devigaj por ĉiuj aliĝintaj organizaĵoj kaj individuaj membroj.

Resume, la enhavo de art. 3 de la Statuto, ĉu formulita en unusola aŭ en du artikoloj de la projekto, devis resti sensanĝa kun la eventuala aldono de la iom vastigaj vortoj pri agado por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj.

Neŭtraleco: La redifino de la principo de neŭtraleco estas la plej malbona novaĵo de la projekto, fakte katastrofa por la estonteco de UEA, se oni esceptas la relative negravan aldonon, ke UEA ne estas neŭtrala rilate la lingvan problemon. Tamen, ankaŭ tio povis esti formulita pli klare kaj pli koncize per simpla aldono de la precizigo en la fino de la unua alineo de art. 4, kiu en tiu kazo tekstus: «UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj *kun la escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj*». La aldono en la projekto, ke UEA estas «neŭtrala rilate al sekso» estas tute nekomprenebla, eĉ stranga. Se tiu netaŭga formulo devus signifi, ke UEA rekonas la egalrajtecon de la seksoj, tiam ĝi estas superflua, ĉar plene kovrita per la klaŭzo pri la respekto de la homaj rajtoj.

La dua alineo de art. 4 de la Statuto rilate la respekton de la homaj rajtoj estis proponita de mi mem dum la UK en Bern (1947), akceptita tuj de la Komitato kaj poste en la Statuto de 1948. Tio okazis antaŭ la akcepto de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, unuanime (kun kelkaj sindetonoj) adoptita de la Generala Asembleo de UN la 10-an de decembro 1948. Sekve, la sola utila amendo, kiun oni povus fari en la dua alineo, estus la aldono de precizigo rilatanta al la Universala Deklaracio. Do, la unua frazo de tiu alineo devus teksti: «UEA deklaras, ke la respekto de la homaj rajtoj, kiel difinitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de la 10-a de decembro 1948, estas por ĝia laboro esenca kondiĉo». Se oni nepre volis, oni povis aldoni la «bonajn internaciajn rilatojn», kvankam tio estas superflua, ĉar la respekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj ĉie en la mondo estas kondiĉo ankaŭ de bonaj kaj amikaj internaciaj rilatoj.

Por la protekto de la partipolitika neŭtraleco de UEA decidan signifon havas art. 13 de la Statuto. Interalie ĝi preskribas ke nur laŭ orde organizita landa Esperanto-Asocio povas aliĝi al UEA. Plia kondiĉo estas, ke el ĝia Statuto devas klare vidiĝi, ke temas pri asocio neŭtrala en la senco de art. 4 de la Statuto. La projekto ellasas tiujn esencajn kondiĉojn. La celo estas evidenta: konservi en la nuna UEA partipolitikajn instancojn, kiuj tute ne estas «laŭorde organizitaj Esperanto-asocioj» kaj ebligi al similaj partipolitikaj instancoj aliĝi al UEA kaj, kompreneble, reprezenti en la centraj organoj de la Asocio. La klaŭzo en art. 13 de la projekto, ke tiaj organizaĵoj kaj instancoj devas «skribi konfirmi sian pretecon respekti la Statuton de UEA, precipe ĝiajn celojn kaj ĝian neŭtralecon», estas tia naŭvaĵo (por uzi la plej malfortan vorton), ke eĉ infanoj ne povas ĝin rigardi serioza. Ekde Hamburgo estis faritaj pluraj deklaroj pri la «neŭtraleco de UEA», kio neniel malhelpis la partipolitikajn organizaĵojn kaj instancojn en UEA, inkluzive membrojn de ĝia Komitato, plej krude malrespekti kaj la neŭtralecon de la Asocio kaj la elementajn homajn rajtojn. Tio jam transformis la statute difinitan

neŭtralecon en kontraŭstatutan praktikon de malneŭtraleco, kiel prezentite supre. La novaj formuloj fakte leĝigas tiun kontraŭ neŭtralecan praktikon kaj eĉ pli vaste malfermas la pordojn al senbridaj partipolitikaj agadoj en la sino de UEA. Ĝis nun temis nur pri unuflankaj partipolitikaj agadoj, ĉar la landaj asocioj en demokrataj landoj sisteme silentis je ĉiuj atakoj kontraŭ siajn demokratajn sistemojn, registarojn kaj instituciojn. Oni ne povas atendi, ke tia stato daŭros ankoraŭ longe. Tre verŝajne baldaŭ venos reagoj je partipolitikaj unuflankaj agadoj, kio kaŭzos partipolitikajn luktojn interne de UEA, dum la veraj celoj de la Asocio kaj la intereso de Esperanto estos eĉ pli neglektataj, ol ili estas hodiaŭ.

Ankaŭ art. 16 de la Statuto, laŭ kiu la Asocio rajtas fari kontraktojn pri kunlaboro kun internaciaj neneŭtralaj Esperanto-asocioj, «kondiĉe ke tiuj rilatoj ne estu en kontraŭeco kun la principo de art. 4» estas ellasita el la projekto. Fakte, tiu artikolo laŭ la statuta koncepto de neŭtraleco estas vere grava, ĉar ĝi ebligas kunlaboradon eĉ kun neneŭtralaj Esperanto-organizaĵoj por atingi konkretajn celojn favore al Esperanto, se tiu kunlaborado ne kompromitas la neŭtralecon de UEA. Kiel dirite plurfoje en *Horizonto* kaj prilaborite pli detale en ĉap. 7.9 (Kondiĉoj de Unueco) en *HeR*, ĝuste tiu artikolo povas ebligi eliron el la nuna krizo, ĉar ĝi donas al UEA la rajton kunlabori kun partipolitikaj aŭ alispecaj neneŭtralaj Esperanto-organizaĵoj aŭ instancoj por la bono de Esperanto, sed tamen sen kompromiti sian neŭtralecon. La forigo de tiu artikolo, tute konforme al la redifino de «neŭtraleco» en la projekto, ankaŭ formale fermas la pordon por tiu unika ebleco.

Art. 13 kaj 16, aldone al art. 4 de la Statuto, devus resti senŝanĝaj en la projekto, se oni deziras konservi ereton da espero, ke UEA iam denove estu neŭtrala, kia ĝi estis ekde la fondiĝo en 1908 ĝis Hamburgo en 1974.

Funkciuloj: En la projekto troviĝas tuta aro da diversspecaj malglataĵoj kaj kontraŭdiroj. Ekzemple, en art. 11 de la projekto estas ellasita la Honora Patrona Komitato, sed en art. 28 estas dirite, ke la Komitato elektas la membrojn de la Honora Patrona Komitato! Longe antaŭ Hamburgo estis menciita la bezono doni al la individuaj membroj pli da rajtoj. Efektive, laŭ art. 23 de la projekto, la individuaj membroj elektas unu Komitatano B por ĉiu komencita milo da individuaj membroj. Kial tiel alta cifero, precipe se oni konsideras, ke landa asocio kun nur cent membroj rajtas elekti unu Komitatano A? Kial ankaŭ la plia limigo, ke la nombro de Komitatanoj B povas esti maksimume unu duono de la nombro da Komitatanoj A? Sed provizore ni lasu tion kaj menciu nur la vere netaŭgajn, kelkrilate eĉ strangajn, klaŭzojn pri diversaj funkcioj de la Asocio.

Laŭ art. 21 de la Statuto, en ĉiuj lokoj UEA povas esti reprezentita de Delegito, Vicdelegitoj, Fakdelegitoj aŭ aliaj Delegitoj. En la pasinteco oni ĉiam atentis, ke taŭgaj personoj havu tiun reprezentan rolon en siaj lokoj, resp. fakoj. Multaj el ili eĉ fieris pri tiu funkcio. Nun tiu klaŭzo de la Statuto ne plu aperas en la projekto, kaj la rolo de la delegitoj estas konsiderinde malaltigita. Superflue diri, ke estis eble doni pli da rajtoj al la individuaj membroj ĝenerale, sen malgrandigi la rajtojn kaj rolojn de diversspecaj delegitoj, kiuj ja formas unuarangan kaj unikan institucion en la mondo.

En art. 33 de la projekto estas ellasitaj gravaj rajtoj kaj devoj de la prezidanto. Ekzemple, estas ellasita la klaŭzo, ke li prezidas la Komitaton, ke li kontrolas aŭ kontroligas minimume unu fojon ĉiujare la oficejojn de UEA. Plej grave, estas ellasita la klaŭzo, ke en esceptaj kazoj la prezidanto havas la povon de la Estraro aŭ de la Komitato, al kiuj li devas raportiti kiel eble plej baldaŭ por aprobo. Tiu regulo ne troviĝis en la Statuto por plaĉi al tiu aŭ alia prezidanto, nek por doni al prezidanto iajn diktatorajn povojn, sed ĝi estis rezulto de spertoj kaj prudentaj antaŭvidoj. Dum la tuta Dua Mondmilito tiu preskribo ludis gravan, fakte savan pozitivan rolon. Ankaŭ en pluraj aliaj kazoj la eksteraj cirkonstancoj necesigis la aplikon de la klaŭzo, kiun nun la projekto tute superflue ellasas. Aliflanke, la projekto entenas novan klaŭzon, laŭ kiu la prezidanto rajtas ofici dum maksimume du deĵorperiodoj sinsekve. Tio estas tre bona klaŭzo, se oni volas «ludi la ludon de prezidanto» laŭ la ludregulo: nun vi estos prezidanto, poste li aŭ ŝi, poste mi ktp. Sed ĝi estas malbona, se oni atentis la verajn interesojn de la Asocio. Taŭgaj personoj por prezidanteco de monda organizaĵo, precipe de organizaĵo pledanta por afero kiel la nia kontraŭ multaj antaŭjuĝoj kaj aliaj obstakloj, certe ne estas multnombraj. Se UEA trovas tian personon, kiu mem estas preta doni al la Asocio siajn talentojn, sciojn, klarecon, eĉ pozicion en la ekstera mondo, tamen sen riski sian karieron, kial la Asocio estus senigita de tia prezidanto, se la Komitato deziras lin konservi? Kaj kial, cetere, la sama regulo, se ĝi entute estus utila, ne aplikigis al la vicprezidantoj kaj precipe al la ĝenerala sekretario? Laŭ mia scio, neniuj organizaĵoj havas tian absurdan regulon, des malpli, ke kiu ajn prezidanto povas en kiu ajn momento eksigi aŭ ne plu kandidatiĝi, dum aliflanke la Komitato de la Asocio povas per tute normala laŭstatuta proceduro — nepre ne per partipolitikaj konspiroj kaj puĉoj — ŝanĝi la prezidanton kaj la tutan Estraron.

Laŭ art. 30 de la Statuto la ĝenerala sekretario plenumas klare difinitajn taskojn. Ĝuste por plenumo de tiuj taskoj en 1956 estis enkondukita la funkcio de ĝenerala sekretario. En la projekto ĉiuj tiuj taskoj malaperas kaj tute ne estas klare kial, post

la malapero de la taskoj, ankoraŭ aperas la ĝenerala sekretario. Se la nuna gvidantaro fine konstatis, ke ne estas tre facile trovi kompetentan personon por la plenumado de la taskoj menciitaj en art. 30, oni povis aldoni klaŭzon, ke, depende de la cirkonstancoj, la Estraro povas laŭ la propono de la ĝenerala sekretario transdoni la plenumon de iu el la taskoj al alia estrarano.

Konkludo

Kiel dirite, similajn kritikajn rimarkojn oni povus fari pri preskaŭ ĉiuj novaj klaŭzoj en la projekto. La supre analizitaj espereble sufiĉas por montri, ke la projekto ja enkondukas amason da ŝanĝoj, sed ke tiuj ŝanĝoj, anstataŭ ebligi progreson, fakte ĉesigos ankaŭ formale la ekziston de UEA kiel partipolitike neŭtrala Esperanto-organizaĵo, sen kia ajn ebleco ripari la malbonon en la antaŭvidebla estonteco. Eĉ pli, facile povus okazi, ke landaj asocioj, politike neŭtralaj, kaj individuaj esperantistoj, tute senkonsidere al siaj politikaj konvinkoj, inkluzive sincerajn komunistojn, kiuj ja komprenas la eksterrordinaran gravecon de partipolitike neŭtrala internacia Esperanto-organizaĵo, formu novan mondan Esperanto-Asociacion por daŭrigi la tradiciojn de la partipolitike neŭtrala ĝishamburga UEA. La intereso de la Internacia Lingvo kaj de la tuta Esperanto-Movado postulas, ke tio ne okazu. Tio signifas, ke ĉiuj pozitivaj fortoj en la nuna UEA — kaj tiaj ekzistas kaj en la landaj asocioj kaj inter la individua membraro — forte aŭdigu sian voĉon kontraŭ la tutan projekton en la nuna formo, sed tute speciale kontraŭ la klaŭzojn rilate neŭtralecon.

Ivo Lapenna

LINGVA INCIDENTO EN LA EŬROPA PARLAMENTO

Laŭ la franca gazeto «LE MONDE» de la 20.1/79 (p. 9) starigis en la Eŭropa Parlamento de Strasburgo problemo pri la t.n. minoritataj lingvoj en la 18-a de januaro.

Kiam oni elvokis la riĉecon kaj variecon de la eŭropa kultura heredaĵo, s-ro Robert Thomas Ellis (el Britio) intervenis per mikrofono, sed neniuj interpretistoj povis traduki, ĉar li ekparolis en sia gepatra lingvo, la kimra.

De la prezidanta podio la valona vicprezidanto s-ro Pierre Deschamps memorigis al li la reglamenton, laŭ kiu ĉi interveno devas efektiviĝi nur en unu el la ses oficialaj lingvoj de la Parlamento.

Tiam en la angla lingvo s-ro Ellis, kiu devenas de Rhosllanerchrugog (Kimrio), rimarkigis, ke li volis montri, ke la reglamento malhelpas intervenantojn esprimi sin per sia gepatra lingvo en debato, kie oni akcentas ja la plurecon de la eŭropa kulturo.

Dume la komunista italino Vera Squarcialupi ekbatalis favore al etnaj minoritatoj; la liberala Russel Johnston laŭdis la belajojn de la skota gaela lingvo; kaj la socialista franco Pierre Lagorce postulis uzorajton por la plurdialekta okcitana, forgesante la leĝproponon de lia partio por Esperanto.

Ne malofte oni ja kontraŭstarigas al Esperanto per la argumento de la kultura plureco kaj varieco; cetere neniel prave, ĉar la adopto de Esperanto ebligus pli ĝuste konservi egalan rajtecon inter ĉiuj etnaj lingvoj. Sed en la nunaj cirkonstancoj la Parla-menta incidento substrekas le nekoherecon de tiu politiko, kiu elvokas la plurecon nur por pli facile altrudi la privilegiecon de kelkaj lingvoj.

Jean Thierry

ABONO AL «HORIZONTO»

Jen nia unua numero por la jaro 1979-a. Nia deziro estis kaj restas ke la revuo estu plaĉa al vi. Vian jarkotizon por 1979, vi povas pagi rekte al la Administracio aŭ al niaj perantoj laŭ la listo, kiu aperas en la revuo.

Malgraŭ la devaluto de la peseto kaj pro la alta plialtiĝo de la kostoj en Hispanujo, mi petas ke vi ĉiuj pagu favore al la revuo, saman ĝisnunan kotizon en via respektiva valuto.

Kiu sendos per banko ia ajn pagon al la Administracio de «Horizonto», bv. aldoni 100 pesetojn por kovri la banko-kostojn. Dankon!

Inés Gastón

POR LA INTEGRIGO

(Noto de la redakcio: Tiu ĉi artikolo de D-ro Paul Neergaard, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, estis verkita en majo 1974 kaj sendita ankaŭ al la redakcio de *Esperanto*, kiu rifuzis ĝin publikigi. Pro ĝia historia valoro kaj aktualeco, precipe en ligo kun la detrua karaktero de la nova Statutprojekto de UEA, la redakcio de *Horizonto* publikigas la artikolon komplete.)

Profunde maltrankviligita de la informoj donitaj en la artikolo «U.E.A. en Danĝero de Malintegriĝo» en la aprila n-ro de *Esperanto*, mi ne povas ne reagi. Ŝajnas vere, ke kelkaj komentarioj ne estos superflujaj.

Mi estas konvinkita, ke la granda plimulto de la membraro de U.E.A., kaj de aktivaj esperantistoj cetere, konsentas pri la principoj de nepra sendependeco de unuopaj politikaj direktoj kaj de plena demokrateco en organizado, principoj, kiujn eksplikis tute klare Lapenna en sia artikolo. Se oni retrorigardas la evoluon de la Esperanto-movado ĝenerale, kaj de U.E.A. speciale, dum la lastaj du-tri jardekoj, dum kiuj ĝi profitis el la laborkapablo kaj intelekto de Lapenna, elstaras la jenaj establiĝintaj faktoj, kiuj kreis ne malpli ol novan epokon en la historio de la movado:

- (1) *Formuliĝo kaj realigo de kulturpolitiko, signita de aktiveco humanisma*, kaj ne ekskluzive esperantisma, en la defendo de ĉiuj postuloj de la Homaj Rajtoj, speciale, nature, kontraŭ ĉiuj formoj de lingva diskriminacio.
- (2) *Ĝenerala neŭtraleco de U.E.A. kaj de la ĝenerala Esperanto-movado*, t.e. sendependeco de unuopaj politikaj partioj, religioj aŭ filizofioj, respektante la rajton de unuopaj vivkonceptoj esprimiĝi.
- (3) *Stabiliĝo de la ekonomia situacio de U.E.A.*, per konsiderinda kresko de la membraro kaj de la kapitalo de la asocio dum la pasintaj 25 jaroj.
- (4) *Stabiliĝo de la Esperanto-literaturo, speciale el vidpunktoj beletristikaj kaj filologiaj lingvistikaj*, kiel evidentiĝas el la apero de preskaŭ cent elstaraj Stafetolibroj, de la Serio Oriento-Okcidento, de Plena Ilustrita vortaro, egalnivela al similaj vortaroj en naciaj ĉeflingvoj, kaj altnivelaj E-lingvistikaj kaj filologiaj verkoj (tiuj pri pasivaj participoj; milpaĝa Esearo de Waringhien). Tiu tute impresa evoluo dependis kaj plue dependos de la forteco de la movado, speciale de U.E.A., same kiel reciproke tiu evoluo mem fortigas la movadon kaj plivastigas ĝiajn perspektivojn.
- (5) *Pliserioziĝo de nia informado*, nun pli science bazita kaj pli sobre formulita ol en antaŭaj tempoj, kiam regis sugestia kaj ofte iom naŭva propagando.
- (6) *Eksplacita formulado de perspektivoj, laboroj kaj celoj*, kiel tio esprimiĝas en konkretaj laborplanoj kaj ilia plenumiĝo, plue en internacia koordinado de diversaj aktivecoj kiel tiu de profesia lerneja instruado de Esperanto sur eksperimenta bazo, sub aŭspicio de instrumisterioj. (Cetere, plian koordinadon oni devus atingi ankaŭ en diversaj sferoj de praktika aplikado, ekz. en la uzado por turismo, en kiu malpli da sporadeco en la uzado, pli da samtempeco, estus dezirinda kaj verŝajne atingebla.)

La pozitivaj rezultoj atingitaj dum la lastaj du-tri jardekoj, dum periodo malfacila al ideologismaj movadoj pro la vasta pasivismo, kiun induktadas la televido, estas evidenta: Esperanto kaj ĝiaj defendantoj estas hodiaŭ respektataj en la ĝenerala publiko pli ol antaŭe, situacio tamen ĉiam dependanta de la nivelo de la loka movado.

La ĉefa advokato de la supraj principoj, kaj ilia ĉefa iniciatinto kaj realiganto, estas Ivo Lapenna. Ni ŝuldas al li, same kiel al lojalaj kaj kompetentaj kunlaborantoj, tiun turniĝon de la Esperanto-movado en la direkton de pli da sobreco, pli da precizeco kaj pli da koordinado, kio, finfine, nur povas motivigi plian integriĝon — kaj ne malplian integriĝon — de U.E.A. kaj de la movado ĝenerale.

La personeco de Ivo Lapenna estas la plej bona garantio por plua science bazita kaj teknike kompetenta laborado por ĉiam plua enkondukado de Esperanto en la praktikan vivon, por plutenado de la humanismaj principoj kaj celoj de nia movado, kaj por pluportado de ĝia kulturpolitiko, mallonge, por perspektiva dinamismo.



*Prelego de D-ro Oton Pancer
okaze de la IV^a I.K. de NEM.*

LA AGRIKULTURO KAJ LA HORTIKULTURO DE EŬROPO KAJ ILIA ROLO EN INTERNACIA KUNLABORO

Por ke la homoj povu ekzisti kaj agi ili nepre devas disponi je sanaj aero kaj akvo kaj je sufiĉe da bonkvalita manĝo. Estas interese ekscii kian rolon en ĉio tio ĉi povas ludi tri gravaj ekonomiaj agadoj: la agrikulturo, la hortikulturo kaj la arbarkulturo.

Ili tri nur parte povas partopreni en la provizado de la homaro per trinkakvo, kaj tiamaniere ankaŭ de la popoloj apartenantaj al la «maljuna damo», kiel oni ŝerce nomigas la kontinenton Eŭropo.

Pli multe ili povas prizorgi sanan aeron, precipe la arbarkulturo. En la mondo kiel tuto, bedaŭrinde, la arbaroj daŭre malaperadas. Komparante la staton de la periodo 1961-65 kun tiu de la jaro 1975, oni konstatas, ke feliĉe tamen en kelkaj landoj de Eŭropo iomete pligrandiĝis la surfaco de la lando kovrita de arbaroj: en la evoluintaj landoj Francio, Italio, Nederlando, Unuiĝinta Regno (Britio kun la insuloj) pli multe ol en Aŭstrio, Danlando, Svisio. Tio ĉi okazis ankaŭ en la ne tiel evoluintaj landoj, kiaj estas Bulgario, Grekio, Hispanio, Hungario, Jugoslavio, Polio, Portugalio. Sed konsiderante la pligrandiĝon de la loĝantaro en jam dense loĝataj landoj de Eŭropo, sekve la konstruadon de urboj, ŝoseoj k.s. la prognozo rilate la necesan minimumon de arbaroj ne povas esti plena je optimismo.

Ne malpli grava kondiĉo por efektiviĝo de feliĉa, enhava, kultura vivo de la homoj, krom sanaj aero kaj akvo, estas la nutraĵoj kaj krudmaterialo por produk-

tado de vestoj kaj ŝuoj, plejparte produktoj de la agrikulturo kaj hortikulturo.

En la pasintaj jarcentoj Eŭropo estis ofte turmentata de malsato. La malnovaj konceptoj de nutradistoj prijuĝas la staton de sufiĉo aŭ nesufiĉo de nutrado laŭ la kvanto de la konsumitaj kalorioj, kaj laŭ tiu ĉi koncepto de bona nutrado preskaŭ ĉiuj eŭropanoj nuntempe povus esti kontentaj. Ekzemple en la jaro 1974, en la plej malriĉa lando de Eŭropo, nome en Albanio, la ĉiutaga manĝo enhavas po opa loĝanto 2523 kaloriojn, kio ne estas malfavora. En ĉiuj aliaj eŭropaj landoj oni tage manĝis, en la sama jaro, eĉ pli ol tri mil kaloriojn.

Diferencojn inter du grupoj de eŭropaj landoj, nome inter la tre evoluintaj kaj ne sufiĉe evoluintaj, oni konstatas, se oni konsideras por ambaŭ grupoj de la landoj tri kriteriojn gravajn el la vidpunkto de la agrara ekonomiko:

1) la valoro de la jara brutta nacia produkto de ĉiu opa loĝanto meze atingita en ĉiuj ekonomiaj branĉoj kune;

2) la ŝanĝiĝo de la procento de la produktantoj agantaj en la agrikulturo kiel tuto, t.e. ankaŭ en la hortikulturo;

3) la konsisto de manĝoj, meze konsumataj de opa loĝanto de koncernaj landoj.

1-e) Laŭ la raporto de la Monda banko por la jaro 1975, la jara meza valoro de la brutta nacia produkto de ĉiu opa loĝanto en la plimulto de eŭropaj landoj estas ĉe la pinto de la skalo, sur kiu troviĝas 105

landoj, membroj de la Unuiĝintaj Nacioj. En tiu jaro la unuaj dudek kvin landoj de la mondo estas dekkvar eŭropaj (el la tuto de 28 eŭropaj ŝtatoj) kaj nur dekunu ekstereŭropaj: Abu Dabi - 13500 US dolaroj*, Kuvajto 11640, Svedio 6720, Usono 6640, Kanado 6080, FR Germanio 5890, Danlando 5820, Luksenburgo 5690, Islando 5550, Norvegio 5280, Belgio 5210, Francio 5129, Nederlando 4880, Aŭstralio 4760, Finnlando 4130, Novzelando 4100, Aŭstrio 4050, Japanio 3880, G.D.R. 3430, Izraelo 3380, Unuiĝinta Regno 3360, Libio 3360, Ĉeĥoslovakio 3220, Polio 2450.

2-e) Konate estas, ke interalie riĉajn landojn karakterizas daŭra malgrandiĝo de la «agrikultura loĝantaro» kaj de la procento de la tuta nombro de produktantoj kiu agas en la agrikultura produktado. La komparo kun kelkaj el la plej evoluintaj ekstereŭropaj landoj (vidu la tabelon) montras tion ĉi: en multaj eŭropaj landoj, nome en la evoluintaj, relative tre malgranda nombro de la agrikulturaj kaj hortikulturaj produktantoj nutras grandan nombron de loĝantoj de siaj landoj. Kontraŭe, feliĉe, nur en malmultaj landoj de Eŭropo ankoraŭ laboras en la agrikulturo amaso da homoj, kaj ĝis nun ne sukcesante bone provizi per agrikulturaj kaj hortikulturaj produktoj la tutan loĝantaron (vidu la landojn sub numeroj 1, 4, 11, 16, 21), simile al kelkaj ne tre evoluintaj ekstereŭropaj landoj, menciitaj en tiu ĉi tabelo.

Ne estas eble en tiu ĉi mallonga artikolo analizi la influon de diversaj sociaj kaj politikaj sistemoj, en kiu rilato vere la eŭropaj landoj diferencas inter si, sur la nombron de la «agrikultura loĝantaro» kaj sur la procenton de agrikulturaj produktantoj en la tuto de ekonomie aktivaj personoj, kaj sekve sur la rezulton de la agrikulturo kaj hortikulturo.

3-e) Kiel jam estas menciite, la manĝoj preskaŭ en ĉiuj landoj de Eŭropo kontentigas la postulon de la malnovaj konceptoj de la nutradisma scienco: okazas konsumado de pli ol 2500 kalorioj tage. La atingita favora rezulto estas konforma al la ĝenerala progreso de la eŭropa ekonomio.

La kalorioj precipe devenas de la produktoj de la kampoj, unue de la cerealoj kaj terpomoj, sed ankaŭ de la sukerbeto kaj de oleaj plantoj. Grava dua fonto de kalorioj estas ankaŭ la bredado de bestoj, nome de produktoj de ili: la viando, la lakto kaj la ovoj, aldone la produktado kaj kaptado de fiŝoj. La hortikulturaj produktoj dum la regado de la «kaloria koncepto» ne ludis gravan rolon ne enhavante en si multajn kaloriojn.

La nuntempaj nutradistoj venis al la konkludo, ke ne estas nur grava la kvanto de kalorioj en la manĝoj, sed ankaŭ la kvanto de animalaj proteinoj, krome la kvanto de aliaj multaj substancoj, je kiuj estas riĉaj la legomoj kaj la fruktoj. Feliĉe la plimulto de eŭropanoj jam konsumas preskaŭ sufiĉan kvanton da animalaj

proteinoj, sed la konsumo de fruktoj kaj eĉ pli de freŝaj legomoj ne estas kontentiga.

La produktado de la legomoj kaj fruktoj kaj la hortikulturo kiel tuto estas komplika ekonomia agado, kaj nepre oni devas konsideri ĝiajn konatajn kvar ecojn, se oni deziras kompreni la nekontentigan staton de ĝi eĉ en la plej evoluintaj landoj.

La unua eco estas neceso de zorga kulturado de la hortikulturaj plantoj kaj aldone aparta zorgo pri la varoj kiujn ili donas, kaj pro tio la hortikulturo malgraŭ evoluinta mehanizado kaj vasta apliko de aŭtomatoj kaŭzas la neceson de relative multe da manlaboro.

La dua eco estas teoria ebleco manĝi aŭ alimaniere konsumi (ekz. la dekorajn plantojn) ilin freŝajn kaj ne prilaboritajn, eĉ la grandan plimulton de legomoj sen kuirado. (Estas menciinde, ke eĉ tre kleraj konsumantoj opinias, ke la plimulto da legomoj devas esti kuirataj, kaj en tio ĉi eraras.)

La tria eco estas ke ekzistas multaj malfacilaĵoj por tia konsumo de freŝa varo, ĉar multaj el tiuj produktoj estas tre putrigemaj kaj pro tio ĉi la transporto de ili estas tre malfacila. Krome ili estas produktataj aŭ dum unu sezono aŭ eĉ dum iu tre mallonga periodo, kaj, se temas pri granda amaso da produktoj, ne estas ebla tuja konsumado de ili. La produktado en forcejoj plilongigas la periodon de produktado, sed ankaŭ ĝi ne povas provizi freŝan varon dum la tuta jaro. Sekve eĉ en plej evoluintaj landoj la konsumo de fruktoj dum la tuta jaro postulas, ke oni ilin parte staplas en magazenoj, uzante malaltan temperaturon aŭ kemiaĵojn aŭ ke oni ilin konservas uzante tre altan temperaturon, kaj tiamaniere oni devas eĉ pli multe trakti la legomojn, preskaŭ 70 % de la tuta jara konsumo da ili.

La kvara eco estas, kiel konsekvenco de la unua kaj tria, ke en la hortikulturo ekestas tre alta grado de intenseco de produktado, multe pli alta ol en la agrikultura produktado sur kampoj: multaj horoj da manlaboro, multaj teknikaj iloj, maŝinoj kaj aparatoj, kemiaĵoj kaj aliaj produktiloj.

Malgraŭ tiuj ĉi ecoj de la hortikulturo, kiuj ĝin prezentas kiel tre komplika agado, oni en multaj landoj de Eŭropo jam sukcesas, aldone al evoluinta produktado sur kampoj kaj tia produktado de bestoj, efektivigi altrangan hortikulturon kaj tiel sufiĉe bone nutri siajn loĝantojn: doni meze tage pli ol 40 gramoj da animalaj proteinoj al ĉiu opa loĝanto, pli ol 220 gramoj da legomoj kaj pli ol 220 gramoj da fruktoj (vidu la tabelon).

Por atingi tian sukceson oni devis apliki en granda skalo la rezultojn de la tri gravaj grupoj da sciencoj: biologiaj, teknikaj kaj socio ekonomiaj. Tio signifas uzi bone kulturitan grundon, bonkvalitan semon, altkvalitajn nutraĵojn por la plantoj kaj bestoj, plej konvenaj kemiaĵojn

kaj alian materialon por protektado de la plantoj kaj de la bestoj, konvenajn man-laborilojn, maŝinojn, aparatojn, modernajn metodojn de mastrumado de la farm-bienoj, de aĉetado de produktiloj kaj de vendado de la produktoj, (por kio oni uzas la vorton «marketing»).

En la hodiaŭa ĉiam pli kaj pli interli-gita mondo ne povas resti la stato, ke en unuj landoj oni havu tre evoluintan agri-kulturon kaj hortikulturon kaj en la aliaj kontraŭe tre malprogresan. Estus necese larĝskale kunlabori ne nur en la scienco, sed ankaŭ en transigo de scio kaj mate-ria helpo, en ĉiuj direktoj, irante de eŭro-paj kaj ekstereŭropaj evoluintaj landoj al malpli evoluintaj: en Eŭropo mem, ĉar en ĝia kadro ekzistas ankaŭ diverseco en la nivelo de evoluo. Ĉar, estas tre reko-mendinde raciigi ĉiun tiun agadon, nepre oni devas pledi por forigo de la lingvaj barieroj kaj uzo de internacia lingvo en

la efektivigado de tiuj ĉi praktikaj celoj de la homa vivo.

Lastatempe oni ĉiam pli kaj pli konvin-kiĝas, eĉ en diversaj ideologiaj rondoj, ke estas ankaŭ necese kunligi la sociologiajn konceptojn kun la ekonomiaj, kio intera-lie signifas ankaŭ en la agrikulturo kaj hortikulturo observi la principojn de la humanisma internacieco. Tiel ni venas al la dua, aldone al la praktika aspekto de neceso de la internacia lingvo, nome al la idea.

* Svisio ne estas menciita, ĉar ĝi ne apartenas al la UN, krome kalkulante pri 28 ŝtatoj oni neglektas la tre malgrandajn kvar ŝtatojn.

Literaturo: Jarlibroj de F A O, Romo, pri agrikul-tura produktado kaj komerco (FAO Yearbook, Pro-duction, Trade, 1971, 1975, 1976).

Raporto de la Monda banko (World Bank: Natio-nal Product), 1975.

TABELO 1. — KELKAJ INFORMOJ PRI LA EUROPAJ KAJ KELKAJ EKSTEREUROPAJ LANDOJ, KONCERNE LA EKONOMIKON DE AGRIKULTURO KAJ HORTIKULTURO.

Nu- me- ro	Lando	% da aktivaj en agrikulturo de ĉiuj ekonomie aktivaj, en la jaroj		Ĉiu opa agrikul- turisto nutras tiun nombron da loĝantoj en la jaro		Konsumo po 1 loĝanto meza, taga, gramoj animalaj protei- noj en legomoj fruktoj		
		1960	1975	1950	1970	1974		
1	Albanio	71,4	63,3	—	—	19,4	82	97
2	Austrio	23,0	11,7	4	11	51,8	181	289
3	Belgio	8,0	3,8	10	35	60,9	239	222
4	Bulgario	56,5	39,7	—	—	37,6	247	149
5	Ceho Slovakio	25,7	13,2	—	14	56,1	224	155
6	Danlando	18,1	8,9	20	37	60,4	146	171
7	Finlando	36,1	16,7	—	—	62,7	56	138
8	Francio	22,1	10,9	6	16	62,1	358	237
9	Germana DR	17,6	11,2	—	—	55,5	199	154
10	FR Germanio	14,2	5,5	5	13	55,6	178	318
11	Grekio	55,8	41,4	5,2	4,8	45,5	382	397
12	Hispanio	42,1	21,3	7	8	47,1	354	253
13	Hungario	38,1	19,9	—	8	42,6	228	199
14	Irlando	36,5	23,5	—	—	65,6	171	133
15	Italio	30,8	14,6	5	10	43,1	466	296
16	Jugoslavio	63,7	43,5	2,5	5	30,8	167	178
17	Nederlando	10,8	6,6	14	52	55,1	233	245
18	Norvegio	19,7	9,6	10	15	65,0	95	202
19	Polio	48,2	34,6	—	5	58,7	261	63
20	Portugalio	44,1	29,6	5	7	40,6	389	260
21	Rumanio	64,5	51,6	—	—	36,8	164	97
22	Sovetio	41,9	20,5	—	6	54,2	186	58
23	Svedio	14,1	6,5	8	18	57,8	110	262
24	Svislando	11,4	6,4	—	—	55,9	227	459
25	Unuiginta Regno	4,0	2,4	11	35	56,6	170	155
26	Kanado	13,2	6,5	16	46	65,3	213	230
27	Usono	6,6	2,8	20	64	71,7	318	276
28	Brazilo	51,9	42,0	—	—	21,3	40	150
29	Egiptio	58,4	52,4	7	7,62	10,3	288	199
30	Izraelo	14,3	8,2	—	24	52,8	331	410
31	Japanio	32,4	14,8	4	8	41,1	362	142
32	Australio	11,4	6,8	24	63	64,3	192	275

Rimarko: la informoj pri konsumo da legomoj kaj fruktoj estas por la landoj sub n-ro 1, 4, 5, 19, 21, 22, por la jaroj 1964-1966, por ĉiuj aliaj plejparte por la jaroj 69 aŭ 70 aŭ 71.

Ĉu Ekzistas "Nederlanda" Lingvo?

La plua ekzistado de la terminoj flandra kaj holanda malfaciligas, ke en multaj lokoj en la mondo la homoj sciu, ke la norma lingvo en norda Belgio (Flandrujo) kaj en Nederlando estas la sama kaj nomiĝas «nederlanda». Ofte ni ankaŭ aŭdas ke ne nur Flandroj, sed ankaŭ Nederlandanoj, parolas pri ABN (Algemeen Beschaft Nederlands) por designi la «ĝeneralan civilizitan nederlandan». La uzado de tiu siglo rezultas parte el la tabuo, kiu kuŝis sur la termino «nederlanda» en Belgio, kiam la franca estis la sola deviga kulturlingvo por ĉiuj Belgoj. La nederlanda lingvo estis konsiderata kiel la lingvo de «Holando», kontraŭ kiu la belga ŝtato tenis sin malamike en tiu tempo. Por malkontentigi neniun oni tial devis diri ABN, des pli, ke tiuj tri literoj eĉ estis repuŝontaj la veran nomon de la lingvo. Tial oni antaŭ nelonge oficiale interkonsentis, en la Kulturkonsilio, ke la sola korekta uzota termino estu «nederlanda».

Tamen, estas ankaŭ vero, ke multaj homoj en Belgio kaj Nederlando plu uzas la vorton «flandra» aŭ «holanda» anstataŭ la nova nomo «nederlanda», sed tio ne estas konforme al la lastatempa evoluo. La unueco de la nederlanda lingvoregiono estas klare pruvita en komunaj vortaroj, lernolibroj, literaturo kaj interŝanĝo de televidaj programoj. Revuoj kaj ĵurnaloj uzas la saman lingvon. Ekzistas hodiaŭ proksimume 20 milionoj da nederlandlingvanoj. Tio estas pli ol ĉiuj danaj, norvegaj kaj svedaj parolantoj kune. Ĝi signifas, ke la nederlanda estas mezgranda eŭropa lingvo. Tamen, pro la multeco de terminoj aplikataj al ĝi, la nederlanda lingvoregiono ŝajnas ofte pli malgranda al eksterlandanoj.

Herman Deceuninck
Belgio

O M A Ĝ E

Kun profunda bedaŭro ni informiĝis pri la forpaso de du hispanaj esperantistoj, kies esperantismo — laŭ la linio signita de D-ro Zamenhof — estis bone pruvita; tial, de la unua momento ili estis fervoraj apogantoj de nia laboro favore por la neŭtrala Esperanto-Movado.

ERNESTO MARTINEZ

Cheste (Valencia)

La 1-an de novembro 1978, forpasis S-ro Ernesto Martínez, kies sentoj homaramaj kaj sincera esperantismo respeguliĝis en liaj agoj ekde lia juneco. Li lernis Esperanton antaŭ pli ol kvardek jaroj.

Kiam mi legis la informon pri lia morto, venis en mian memoron la epoko kiam ni ekkonis lin, en la jaro 1939, kiam li, estante ankoraŭ junulo, translokiĝis al Zaragoza, por peti helpon favore al samideano de Cheste, suferanta en malliberejo pro politikaj aferoj, kaŭze de la hispana milito. De tiam, Ernesto Martínez estis kvazaŭ nia frato, kaj ni kune sukcesis liberigi nian valencian samideanon.

Post longa malsano forpasis tiu ĉi homo, kies vivo estis konstanta agado favore al Esperanto kaj al la HOMARO.

I. G.

SALVADOR OLIVAN

Vigo (Pontevedra)

S-ro Salvador Oliván forpasis, kaj foriris de ni por ĉiam, sed ni rememoros lin ĉiun momente. Tian personon malfacile oni povas forgesi, kaj por ni esperantistoj el Galegio, kaj precipe tiuj el Vigo aŭ Ferrol, tio estos neebla. Kiu ne rememoros la bonulon Amiko Salvador kun pakajo sub la brako farantan propagandon, pri Esperanto? Tiu neforgesebla esperantisto ne disdonis nur esperantan propagandon, ĉar li ankaŭ disdonis partojn de sia boneco. Li naskiĝis por esti esperantisto kaj por esti ege bonfarema. Kiom oni diros pri li, estos nesufiĉa!

Ni nomis lin «Apostolo de Esperanto», kaj neniam pli bone uzita tiu ĉi vorto. Vere li estis apostolo, lia tuta vivo estis apostolado, li nur vivis por sia parencaro kaj por Esperanto, kaj tia li mortis. Ni ploros kaj rememoros lin dum nia ekzistado. Ne gravis al li esti ne komprenata, kaj multfoje suferi pro la nescio de kiuj ne volis kompreni lin; eĉ tiel ne mankis rideto en liaj lipoj. Li estis nekapabla enui pro nenio kaj pro neniu. Li ĉiam ekridis.

S-ro Salvador estis nia, jes, nia; li apartenis al la esperanta mondo. Li estis el tiuj, kiuj fidis je la boneco de la homoj; li estis pacamanto kaj por la paco li luktis kuraĝeme, kaj pro tio li estis nia kaj li plu estos nia spirite.

Ripozu pace bona animo!, kaj estu certa ke viaj sekvantoj plu penados imiti vin kiel eble plej bone.

Ni diru: samideano Oliván, ni, ĉiam antaŭen, pro vi kaj pro ni.

Julio Bueno
Vigo, 14-12-78

Nova Numero de Internacia Jura Revuo (IJR)

Jus aperis n-ro 2/78 de Internacia Jura Revuo, organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Tiu ĉi elstara, 48-paĝa faka periodaĵo, kiu aperas du fojojn jare sub la redakto de D-ro Ivo Lapenna, profesoro en la Universitato en Londono, ĉiam enhavas interesajn artikolojn, notojn kaj recenzojn.

En la lasta numero troviĝas longa artikolo de la redaktoro pri «La Internacia Lingvo kiel Jurscienca Komunikilo». Ĝi estas aktuala ne nur el ĝenerale jura terminologia vidpunkto, sed ankaŭ el tiu de la nunaj kaj potencialaj eblecoj de Esperanto sur tiu ĉi grava faka kampo. La artikolo de Prof. Kapelrud, en traduko de la teknika redaktoro de IJR, kand. jur. Tom Arbo Hoeg, estas tre interesa kiel jurhistoria kaj sociologia studo pri la religio kaj socio laŭ la Malnova Testamento. Sir Irvine Goolding, juĝisto de Supera Kortumo kaj prezidanto de la Brita Branĉo de *International Law Association*, prezentas en ege trafa maniero la esencajn trajtojn de la juĝista sistemo en Anglio — sistemo malmulte konata kaj komprenata ekster Britio. La artikolo de D-ro Kaltenbäck priparolas la principan demandon pri la ligiteco de teorio kaj praktiko. Pluraj notoj, recenzo kaj Oficiala Informilo de IJR kompletigas tiun ĉi numeron.

Ĉiuj juristoj, kiuj parolas la Internacian Lingvon, povas fariĝi regulaj membroj de IEAJ; nejuristoj laborantaj en juraj institucioj povas fariĝi neregulaj membroj, dum ĉiuj aliaj povas aboni la revuon, kiu, kvankam faka, estas redaktata en facila stilo kaj popularscience, tiel ke la enhavo estas interesa por ĉiu klera persono. La kotizo por ambaŭ kategorioj de membroj, inkluzive la abonon al IJR, estas 120 aŭstriaj ŝilingoj aŭ egalvaloro. La jarabono por nemembroj estas same tiel 120 aŭstriaj ŝilingoj.

La kotizojn, abonojn kaj kontribuadojn por la Fondaĵo IJR akceptas la sekretario-kasisto D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.

LA POSTMARKKOLEKTADO

En 1978 ni ricevis 70 leterojn kun poŝtmarkoj, kiuj valoris 1200 d. kr. La monon ricevis *Horizonto*. Ni kore dankas al ĉiuj kontribuintoj, precipe al f-ino Koivu, Finnlando; s-ro X, Ĉeĥoslovakio; s-ro Vedrine, Francio; s-ro García Breque, Argentino, kaj s-ro Jeffrei Henriksen, Feroaj Insuloj.

Kun danko daŭre akceptos poŝtmarkojn:

Peter Zacho
Nørregårdsvej 91
2610 Rødovre, Kopenhago
Danlando.

La Administracio de «Horizonto», kaj sekve, la Neŭtrala Esperanto-Movado kore dankas ĉiujn kontribuintojn al tiu valora helpo por nia revuo, kaj petas de ili daŭran kontribuadon.

Aparte mi dankas al nia amiko Peter Zacho pro lia senlaca kaj efika laboro, kaj gratulas lin pro sia bonega rezulto.
Koran dankon al ĉiuj!

DONACIOJ POR «HORIZONTO» - 1978

<i>Gisnuna sumo</i>	82.245 ptoj.	Manuel Sosvilla, Sta. Cruz de la Palma (Hispanujo)	250 »
Josep Ventura, Tarrasa (Hispanujo) ...	1.000 »	Gesinjeroj Maynar, Guia de Isora (Hispanujo)	1.000 »
Victor Ortiz, Zaragoza (Hispanujo) ...	500 »	Gonzalo Arnaiz, Pamplona (Hispanujo) ...	175 »
Joaquin Bielsa, Zaragoza (Hispanujo) ...	1.000 »	Enrique Piquero, Zaragoza (Hispanujo) ...	3.430 »
Enrique Navarro, Zaragoza (Hispanujo)	200 »		
M. Díaz Camacho, Los Llanos Aridane (Hispanujo)	200 »		= 90.000 »

ELEGIO POR MIRINFANO

(Diana Gastón Nicolás,
28.10.1967-9.8.1978)

«Por favor,
mandadme un beso de sueño a sueño

Diana, voĉ perdita inter ventoj
kaj blankaj cirkloj de la luno...

Ĉi-posttagmeze
en lando sudlontana
arumfolioj —
ankoraŭ senkorolaj —
pintis lentuge sub fenestrojlo
kaj nektarema striabel,
kiu pro zumbrio gustumante stumblis
de flora tavernet al taverneto.

Tro tarde mi ekkonis vin,
dolĉega infanino
jam forvelkinta
el buntoj kaj odoroj del printempsezono.
Ĉe mi ĝi plenas, dum ĉi tagoj,
je larĝa suno
kaj nuboj super montoj,
altaj kiel la pensoj de infano,
en kontinento kie mankas —
laŭ via varma korbildajo —
nek la ĝirafo nek la virleon.
Kaj certe ĉirkaŭ Iberujo
el historiprofundo
la ondoj nun ankoraŭ murmuradas,
inter la plaĝo kaj la ventjetataj mevoj,
silabojn oldhispane bluajn
aŭ grizajn kiel la soldatlatin el ŝtalo:
fiera heredaĵo apud *mare nostrum*.
El akvo super la krepuskon
leviĝas
la revalida luno,
arĝentmonero sulkvizaĝa
ofte kaj ofte pludonata
por la senfinaj intertraktoj de la koro.

Ho poedinjo, vi naskiĝis por la miro
kaj glorgezon
de lando kiu laste tro silentis.
Sed jen la fiekrompo
en insulet fatala, apud kies bordo,
pro angloj kaj perfido de la ventoj,
la reĝa revo estis frakasita
kaj fundeniĝis Floto
kun kargo da esperoj.
Sed ĉu pli riĉaj
ol vi,
plej doloriga perdo por patrujo?

Kaj ĉiu homa miso estas mia.
Tial nun hantas
votravo
fro menso kiu stumblis el la lumo
kaj ne pluviros
en regionojn de la sorĉo.

Min ĉirkaŭŝvebas
super la krutoj del momento,
kvazaŭ de trans Alhambra korto
aŭ punta sonĝebur,
ĉi kastilia spir viola
el buŝ knabina
eksufokita en tro frua hor.

Kaj kion diri pli?
Finfine eble nur —
ho mirburgono,
falinta, kara flor de Hispanujo —
ke malgraŭ la tenebro kaj distancoj
mi sendas jen al vi
ĉi kison,
salute adiaŭan,
por viaj forkliniĝo kaj dormado.

Kaj cirklon daŭre rekomencas
la blanka, leviĝanta luno.

7.11.1978

Edwin de Kock
Respubliko de Sud-Afriko

TURTO KAJ KOLOMBO

Base la nuboj. Brizo. Frumatene
fro ie inter la folioj, plenaj
de pluvodor kaj susuraĵo frida,
la turto kontraŭkveras ĵusan nokton
da ŝtormoj, arbosku kaj timsonĝado —
el regionoj preter homcerbum.

Sed apud mia kapo sur kuseno
unu kolombo en la kaĝ, komforta
ĉar kontraŭ nia mur por noktato,
bruas abrupte. Voĉo kaj flugiloj
protestas vivmalvaston, dum respondas
la kor al ĉio dista kaj obskura.

28.1.1978

Edwin de Kock
Respubliko de Sud-Afriko

INFANOPREĜO

(Verkita pro peto de studentino kolektanta
infanopreĝojn en diversaj lingvoj)

Patro, mi petas nun, infano,
ke Vi min prenu je la mano.
Tra horoj de la sunohelo
sur mia vojo gvidu min
ĝis nokto kaj sekura fin,
fro tie ĉi al la ĉielo.
AMEN.

11.3.1978

Edwin de Kock
Respubliko de Sud-Afriko

TANKAO

Alta muro.
Tagvojo jam ne longa.
Grimproz emfazo,
ruĝa ĝis vespersune,
kaj aŭtuna ekstazo.

7.10.1978

TANKAO

Si atentigis,
ke tamen duan fojon
floras la rozo.
Jes, kara, mi jam scias
pri ĉi aŭtunalmozo.

17.10.1978

Edwin de Kock
Respubliko de Sud-Afriko

ĈU VERE EKZISTAS LA MATEMATIKO DE LA HISTORIO?

En sia apoteko de Figueres, daŭre, persiste, per propraj klopodado, iniciato kaj denaska serĉemo, de antaŭ multaj jaroj Prof. Alexandre DEULOFEU cerbumadas — filozofadas, trastudas la realiĝintajn evoluŝanĝojn de la malnovaj kaj modernaj landaj historioj, kaj ankaŭ tiujn de jam tute malaperintaj civilizacioj kiuj plej elstaris ĉiuepoke. Li entreprenis tion kun tiu sama entuziasmo kiun li uzis por ensekretiĝi, por ekzemplo, en la ekaperon de la romanika arto tiel disvastiĝinta en lia vasta ĉirkaŭregiono.

Lia loĝurbo estas grava geografia centro de tiu natura nord-orienta katalunlanda parto nomata Empordà (nomo devenanta de la helena kolonio Emporeion, aŭ Empòrion), kiu distingiĝas, krom per multaj atentindaj homaj faktoj, per la preskaŭ konstanta forta impeta blovado de norda vento kiu ankaŭ tie alprenas la nomon Tramontano. Oni iom ŝerce diradas ke, tie, ĝi aŭ frenezetigas la cerbojn, aŭ ilin klerigas per tre karakteriza geniece. Kaj tre variaj evidentaj faktoj ŝajnas pravigi tion.

A. Deulofeu, estinta profesoro pri ĥemio, asertas ke li eltrovis la «matematikon de la historio», post profunda multjara trastudado de la plej variaj historiaj cirkonstancoj jen gloraj, jen malgloraj — jen favoraj, jen malfavoraj —, de la homaro. Li estas plene konvinkita je tio, kaj tial li verkis kaj publikigis por tion diskonigi — por pruvi siajn asertojn — deksep pli-malpli dikajn volumojn kaj broŝurojn, per kiuj li eksplikas kaj diserigas detale sian teorion.

Ne nur en la medioj de la apoteko kaj studĉambro li, dum tri jardekoj, meditadis ĝis li trovis tiujn — laŭ lia diro — nekontesteban faktorojn por povi klarvide antaŭdiri la okazontajn plej reliefajn historiajn eventojn, sed ankaŭ dum sia ekziliĝo en 1939-a, for de la patrujo (dum li praktikis propravole por spertiĝo plej diversajn metiojn kaj estis studento en Montpeliero), li trovis tempon kaj sufiĉajn motivojn por sia iompostioma enprofundiĝo en la teorion kiun li fide kaj fiere de longe prezentadas, bazitan sur plej rigoraj sciencaj metodoj, profundaj analizoj kaj bazaj komparoj, starigante leĝon: la matematikan ciklon de la historio, similajn al tiuj de la sezonoj aŭ reveno de kometoj, i.a.

A. Deulofeu firmiĝis en la konkludo ke ĉiu imperio, civilizacio aŭ memstara lando, estas senescepte submetata al sama diversgrada evoluado daŭranta pli-malpli 550 jarojn. Tial li klarigas tiujn enigmajn kialojn pri la apero kaj, post jarcentoj, estingiĝo de gravaj disvastiĝintaj ŝtatoj kaj kulturoj, kies atestaj restaĵoj troviĝantaj dise en ĉiu kontinento, vekas plej sinceran admiron, kaj starigas nesolveblajn demandojn. Ili, do, pravigas la simplan rimarkon ke ĉio naskiĝas el nenio kaj revenas al nenio, sed ne hazarde nek flanke de iu universala mistera forto.

Li trastudis pasie por pravigi sian hipotezon, inter aliaj, la historian evoluadon de plej diversaj estingiĝintaj imperioj, kiel la kartaga, macedona, roma, vikinga, gota, bizanca, ktp. En ĉiu el ili montriĝas, laŭ lia perceptado, la same perfekta — kvazaŭ biologia — evolucio kaj samaj stadioj inter iliaj respektivaj apero kaj malapero.

La unua stadio karakteriĝas ĉiam per evidente agresemo, laŭ la rimedoj de la koncerna epoko; sekvas, poste, alia periodo de tre notinda malpliĝa influa prestiĝo, sed ree la agresemo povas sin montri diverse. Tamen, tio estas kaŭzo de grava milita malvenko el kiu la respektiva lando ekforĝas iom poste, denove kaj firme, kaj pli sukcese ol antaŭe, sian plej konsiderindan kaj maksimuman povon ĝis ĝi atingas evidentan imperian rangon aŭ nacian brilon kiuj establiĝadas longe: ĝis la ekmanifestiĝo de pli kaj pli kreskanta nepre definitiva dekadenco — deklivo glitiganta al absoluta diserigo. Forpasis entute, kiel dirite, proksimume, 550 jaroj.

Rilate la evoluadon de la hispana imperio — kiel facile konstatebla kaj studebla ekzemplo el tiu teorio, Alexandre Deulofeu fiksas unu komencan kaj reliefan daton kiu sendube brilegas en la nokta kaj ankaŭ en la lazura firmamento de la historio, kiel unuagrada stelo: jen la jaro 1479-a, kiel komenciĝo de la ciklo por Hispanujo. Tiujare geedziĝis Fernando, reĝo de Aragono kaj grafo de Barcelono, kun Izabela, reĝino de Kastilujo. La sekvaj ciklaj stadioj kiuj de tiam eniris en la paĝojn de la kronikoj, ŝajnas, certe, elpravigi la teoriadon de Deulofeu. La jaro 2029-a estos, tre probable por Hispanlando la fina. Restos do, preskaŭ nenio el la antaŭa vere impona imperio, enlanda kaj transmara, kiu komenciĝis dum la politika regado de la tiel nomataj Katolikaj ge-Reĝoj. Kial? Ĉar, inter alie, kelkaj antaŭaj enlandaj regnoj reviviĝos prospere, aŭtonome.

Centoj de aliaj imperioj kaj kulturlandoj naskiĝis kaj mortis, kaj ili devos iam rekomenci (kelkaj jam tion faris) sian historian ciklon. Multaj aliaj troviĝas, kompreneble, nur en la unuaj hezitaj etapoj, same kiel aliaj, nun, rangas en sia plej glora vertico aŭ zenito.

Laŭ la kataluna apotekisto-humanisto-eseisto-historiisto, oni ne povas perforte haltigi aŭ nuligi tiun duonkaŝitan universalan leĝon: oni nur kapablas mildigi iom ĝian malbonon per strategia kaj saĝa politika orientiĝo determinita de tia fato, kaj tiel iom eviti gravajn katastrofojn.

Cu tiu pensulo, kies cerbo estas ŝajne favore viglita de la tramontana batblovado, pravas pri tio skize kaj tro strikte recenzita per tiu-ĉi artikoleto? Cu vere li malkovris la sekreton de la «matematiko de la historio», same kiel Newton eltrovis la leĝon de la universala altirforto, aŭ Einstein elpensis la relativeco-teorion?

Gabriel Mora i Arana

MALPROKSIME DE LA HEJMO

Jam du monatojn David laboras en stabejo. La stabejo troviĝas en granda tendo. Oficas tie kvin sekretarioj. Krom David ĉiuj estas serĝentoj. La sola sekretario, simpla soldato estas David.

Ĉiutage, je la 10-a horo, matene, eniras la leŭtenanto Jankovski, diras «bonan matenon» al David kaj sidiĝas apud li. Komence David leviĝis kaj starante raportis al sia estro pri sia agado de la hieraŭa tago kaj transdonis al li diversajn dokumentojn por subskribo. Tio daŭris nur unu semajnon. Poste, kiam David leviĝis por raportoj, leŭtenanto Jankovski frapis lian ŝultron kaj diris:

— Tiuj formalajoj estas superflujaj. Sidiĝu kaj tute simple rakontu al mi pri via agado dum la hieraŭa tago.

Leŭtenanto Jankovski kutime sidiĝis ĉe la tablo apud David kaj komencis sian paroladon ĉiufoje pri la sama temo:

— Varmega tago hodiaŭ. Hejme ni eĉ ne songis pri tia sufoka klimato. Ni eĉ ne songis, ke la sorto forpelos nin ĝis tiu varmega Irako.

— Konsideru, ke mi ne venis ĉi tien rekte el mia hejmo. En Sovetio ni spertis 60-70 gradojn da malvarmo kaj en tiu ĉi malbenata klimato ni havas 60 gradojn da varmego. Kia diferenco!

— Tial tiom multe da soldatoj estas malsanaj kaj troviĝas en malsanulejoj.

Poste ili interparolis pri la vivo en antaŭmilita Polio kaj rakontis unu al alia pri siaj hejmaj rememoroj.

Post duonhora interparolado leŭtenanto Jankovski diris «ĝis revido» kaj foriris.

Nun la serĝentoj, kiuj dum la tuta tempo silentis, komencis interparoli.

Cu vi scias David? — diris serĝento Kovalski — Tri serĝentoj sidis jam sur via seĝo kaj leŭtenanto Jankovski forpelis ilin unu post la alia. Ili estas analfabetoj kaj ne scias labori, li diris.

— De vi, li estas kontenta, ĉar li havas la okazon paroli kun vi angle — mokis serĝento Górski. — Bedaŭrinde neniu el ni scias tiun strangsonan lingvon.

— Kian paciencon havis nia David — diris serĝento Falek — por ellerni tiom multe da fremdaj lingvoj. Mi ne kapablus fari tion.

— Tial ĉiuj oficiroj venadas konstante al li — diris serĝento Kovalski — Al vi ili ne venas, ĉar de vi neniu utilon ili povas havi.

La interparoladon interrompis juna, belaspekta soldatino kun blondaj haroj kaj bluaj okuloj. Ŝi staris ĉe la eniro kaj rigardis al David. Kiam David ŝin rimar-

kis, li momenton rigardis al ŝi, konsternite li larĝe malfermis la okulojn, per rapida movo leviĝis de la seĝo kaj kuris al ŝi.

— Eliza — li ekkriis per sovaĝa voĉo kaj eksilentis.

Ŝi ĉirkaŭbrakis lin kaj diris per apenaŭ aŭdebla voĉo:

— Trankviliĝu, mia kara. Aŭskultu, mi volas kun vi paroli, sed ne ĉi tie.

— Do ni promenadu iomete ekstere.

Promenadante en tendaro, ili dum kelkaj minutoj silentis. Fine Eliza ekparolis:

— David, ĉu vi imagas mian ĝojon, kiam mi eksciis, ke vi troviĝas ĉi tie... Ke vi vivas... Hieraŭ mi eksciis pri tio... Parolis pri vi mia amato...

— Kiu estas tiu feliĉulo?

Eliza trankviliĝis. Ŝi ridetis kontente kaj diris:

— Leŭtenanto Sosna, mia estonta edzo. Li vin tre laŭdis pro via lingvoscio. Kiam li ellernis la araban lingvon kaj kiamaniere? — li diris kun miro. Leŭtenanto Jankovski havas la plej bonan sekretaron.

Tiel mi eksciis, ke vi troviĝas en stabejo.

Mi diris al li, ke vi estas mia samurbano. Mi vin konas jam multajn jarojn. Mi ankaŭ rakontis, ke hejme vi havis ŝufabrikon.

— Mi tion al neniu ĉi tie rakontis.

— Mi ankaŭ rakontis, ke mia patro havis ŝubutikon kaj la tutan varon li aĉetis ĉe vi. Mia patro min ofte sendis al vi por fari mendojn kaj pagi monon.

Cu vi aŭdis, David, kion mi rakontis al leŭtenanto Sosna? Mia patro havis ŝubutikon. Mi vin konas, David, kaj mi sciis, ke vi estas ĝentila homo. Mi vin ĉiam ŝatis kaj estas certa, ke vi min ne perfidos. Se iu demandas vin pri mi, vi diros kion vi aŭdis nun de mi.

— Kompreneble — diris David — via peto estas por mi ordono. Mi estas kontenta, ke leŭtenanto Sosna estos via edzo. Li estas simpatia homo kaj mi estas certa, ke atendas vin feliĉa estonto sevi estos lia edzino.

— Mi kredas al vi, ĉar vi ĉiam estis afabla kaj bonkora por mi. Do memoru, ke neniu devas scii, ke mia patro estis malriĉa, sentera kamparano kaj mi — servistino ĉe la familio Goldberg. Neniu ankaŭ devas scii, ke mi neniam vizitis lernejon kaj ke al vi mi ŝuldas dankon, ke mi scias legi kaj skribi. Ĉu vi memoras la vesperojn ĉe familio Goldberg, kiam vi sidis kun mi kaj instruis min legi kaj skribi?

— Ĉu estas eble forgesi la horojn, kiujn ni pasigis ĉe familio Goldberg? La kantoj de la gelaboristoj tie, ankoraŭ sonas en

miaj oreloj. Ho, kiel mi sopiras al tiuj neniam revenontaj tagoj.

— Tiuj estis vesperoj kaj ne tagoj — mokis Eliza. — Nun aŭskultu plu. Oficiroj, kiuj konas mian estontan edzon, rakontis al mi, ke li devenas de riĉa hejmo kaj ĝis la eksplodo de la milito li studadis en universitato. Do mi ne povas rakonti al Sosna la veron pri mia familia stato.

— Estu certa, dolĉa mia Eliza, ke ĉio estos en ordo. Mi rakontos al mia estro pri nia hodiaŭa renkontiĝo kaj pri vi mi rakontos... Mi jam ne volas diri al vi. — Li certe tuj rakontos ĉion al leŭtenanto Sosna.

— Mi dankas al vi, kara Ĉu vi imagas kiel mi amas vin?

— Mi scias. Koro sentas koron. Mi devas diri al vi «ĝis revido», ĉar mi havas tre multe da laboro kaj devas jam reiri stabejon. Ĝis revido, karulino mia!

— Ĝis revido!

Si cirkaŭprenis lin kaj premis lin al sia brusto.

— Ĝis revido! Mi volas pli ofte vidi vin, ĉar vidante vin, mi vidas antaŭ miaj okuloj mian hejmon al kiu mi tiel sopiras.

— Ankaŭ mi havas la saman senton vidante vin.

Li refoje premis ŝian maneton kaj reiris stabejon.

La serĝentoj senpacience atendis lin. Ili volis ekscii detalojn pri la bela soldatino.

Kiam David eniris en la stabeja tendego, ĉiuj serĝentoj unuvoĉe ekkriis:

— Fine vi revenis!

— Kiu estas tiu bela knabino? — demandis Górski.

— Filino de miaj najbaroj, tre ŝatindaj homoj.

— Ne nur oficiroj, sed ankaŭ belulinoj venadas al li — mokis Kovalski.

— Tiu belulino vekis ĉe mi hejmajn rememorojn — diris David.

Li sidigis ĉe la tablo, fermis la okulojn kaj revis. Antaŭ liaj okuloj aperis la tajlora laborejo de lia najbaro Goldberg. Vespere. La laboro jam estas finita, sed la laboristoj sidas sur siaj lokoj kaj ne iras hejmen. Eliza alportas por ili teon. Ili trinkas ĉe la maŝinoj kaj David laŭte legas mallongajn rakontojn de J. L. Perc kaj Salom Alejhem. Ĉiuj atente aŭskultas. Ankaŭ Eliza aŭskultas, kvakam ŝi ne komprenas tiun lingvon.

— Kion vi faros nokte, se vi nun dormas — ekkriis Kovalski.

David malfermis la okulojn. La bela sonĝo malaperis kaj jen li denove troviĝas en varmega dezerto ie en Irako, malproksime de sia hejmo, al kiu li tiel sopiras.

*Ben-Alter Jeĥiel
Israelo*

KIU ESTIS LA UNUA ESPERANTISTO EN AMERIKO?

Bernard Golden

Esperanto ekster Eŭropo

Unu el la plej okulfrapaj fenomenoj de la Esperanto-Movado estas la rapideco, per kiu ĝi disvastiĝis dum la unuaj jaroj, post kiam d-ro Zamenhof publikigis sian unuan modestan lernolibron. La originala rusa eldono de 1887 estis sekvita post mallonga tempo de tradukaĵoj en la pola, germana, franca, angla kaj aliaj lingvoj. Baldaŭ tiu libreto trovis la vojon al ĉiuj partoj de la mondo kaj, kompreneble, ankaŭ al Ameriko.

Krom libroj kaj periodaĵoj, alia faktoro, kiu kondukis al la rapida disvastiĝo de Esperanto trans la landlimoj de Eŭropo estis la prelegvojaĝado de esperantistoj celantaj kontakti kun edukistoj, scienculoj kaj influhavaj politikistoj en foraj landoj por informi ilin pri la ekzisto de la internacia lingvo kaj pri ĝiaj avantaĝoj kiel tutmonda komunikilo. Eble la plej frua eŭropa esperantisto, kiu venis al Ameriko por fari tion, estis la fama germana kemiisto kaj Nobel-premiito Wilhelm Ostwald, antaŭa profesoro ĉe la Universitato de Lejpcigo. Li pasigis la lernejan jaron 1905-1906 kiel gastprofesoro ĉe la Universitato Harvard en Kembriĝo en la ŝtato Masaĉuseco, Usono. Tie, per prelegoj, li informadis pri Esperanto.

Alia speco de vojaĝema esperantisto estas la elmigranto. En la lasta kvarono de la 19-a jc. pluraj ondoj de elmigrado de Eŭropo atingis la marbordojn de Nord- kaj Sudameriko. Inter la novalvenintoj estis homoj, kiuj estis pioniroj en la internacilingva movado en siaj hejmlandoj. Ankoraŭfoje tiuj fruaj esperantistoj ludis la saman rolon en siaj nove adoptitaj landoj. Du ekzemploj, denove el Usono, ilustras tiun agadon.

Feodor Aleksejeviĉ Postnikov, oficiro en la kozaka armeo, fariĝis esperantisto en 1891. Li aktivis en Esperanto-klubo en Peterburgo kaj Vladivostoko, helpis enkonduki Espe-

ranton en Japanion kaj, enmigrinte en Usonon en 1906, li fondis la unuan Esperanto-grupon en Kalifornio en 1907, instruis Esperanton, kaj redaktis kaj eldonis periodaĵon.

John Joseph Sussmuth, tekstila inĝeniero el Aŭstrio-Hungario, lernis Esperanton en 1899 en Svedio, kie li establis klubon en Södertälje unu jaron poste. Li prelegvojaĝis en Germanio kaj fondis revuon tie; poste li organizis kursojn en Budapeŝto. Ekloĝinte en Usono en 1907, li instruis Esperanton en la ŝtatoj Nov-Jorko kaj Nov-Jerzejo, aktivis en la nacia Esperanto-movado de Usono kaj redaktis ĝian organon.

Generale, la frua historio de la Esperanto-movado sur la amerika kontinento estas malbone dokumentita. Laŭ mia scio, ne ekzistas vastampleksa kaj detala historio donanta superrigardon de la enkonduko de Esperanto en la Novan Mondon. Pro tio, donitaĵoj devas esti serĉataj en diversaj kaj obskuraj fontoj havantaj varian fidindecon. Surbaze de la materialoj je mia dispo, mi povas perpece kunmeti parton de la historio — aŭ antaŭhistorio, por tiel diri — de Esperanto en Ameriko, sed estas ankoraŭ multaj breĉoj, kiuj espereble estos plenigitaj per faktoj en la estonteco.

La malabundaj scioj ĉiukaze indikas, ke Esperanto estis disvastigita, unuflanke per la distribuado de publikigaĵoj en kaj pri la nova lingvo, kaj aliflanke per la personaj agadoj de entuziasmoj, kiuj instruis Esperanton, fondis lokajn kaj landajn organizaĵojn kaj redaktis periodaĵojn.

Interesa demando estas: kiu estis la unua Esperantisto en Ameriko? Trarigardo de la historio de la Esperanto-movadoj en la landoj de Nord-, Centr- kaj Sudameriko montras, ke en la plejmulto da landoj, organizitaj landaj movadoj estiĝis dum la fruaj jaroj de la 20-a jc. Kanadaj esperantistoj fariĝis aktivaj en lokaj grupoj tiel frue kiel 1901. Ĉe proksimume la sama tempo, pli sude en Latinameriko, lokaj kaj landaj Esperanto-organizaĵoj kaj revuoj estis fonditaj fare de inspiritaj aktivuloj en Argentino, Bolivio, Brazilo, Ĉilio, Kolombio, Kostariko, Kubo, Gvatemalo, Meksikio, Peruo kaj Venezuelo.

En Usono la semoj de la organizita Esperanto-movado verŝajne estis plantitaj en 1904 ĉe la Monda Ekspozicio en St. Louis, kie John Fogg Twombly, kun la helpo de eŭropaj Esperanto-grupoj, starigis standon por informi la publikon pri la nova internacia lingvo. Sekvante, la unua loka klubo estis fondita en Bostono kun Twombly kiel prezidanto. Mi demandas min, ĉu la membroj de tiu rondo sciis, ke ne tre malproksime de ilia urbo loĝis unu el la plej fruaj eŭropaj esperantistoj?... sed tio anticipas la lastan parton de nia rakonto.

Pioniroj en Ameriko

Por trovi la Esperanto-Kolumbon, kiu «malkovris» la Novan Mondon por la internacia lingvo, estas necese priskribi la laboron de individuaj esperantistoj, kiuj agadis sendepende antaŭ la periodo de organizitaj grupoj kaj movadoj. Ne ekzistas kompleta listo de la esperantistaj pioniroj, kiuj lernis la lingvon en la 19-a jc.; novaj nomoj daŭre venas en la taglumon por doni pli da perspektivo al la bildo de la frua movado en Eŭropo samkiel aliloke. Nun ni eksciu, kio estas trovebla pri la pioniroj de Esperanto en Ameriko. Denove estas ripetende, ke la donitaĵoj estas fragmentaj kaj kelkfoje eĉ kontraŭdiraj.

Laŭ kelkaj fontoj, la unua esperantisto en Argentino estis E. Gösta, kiu komencis sian agadon en 1899 en Buenos-Aireso. Alia pioniro estis iu Polasky, pola rifuĝinto, kiu korespondis kun Zamenhof, sed mankas informoj pri la tempo de lia alveno en Sudameriko. Tamen, en unu el la fruaj adresaroj de esperantistoj estas la nomoj de tri argentinanoj, kiuj povas pretendi antaŭecon. Listigitaj kiel lernintoj de Esperanto en 1894 estas Nikolas Clark, Leon Deck kaj Carlos Serraz, ĉiuj en la urbo Santa Fé. En la najbara Urugvajo, Enrique Muñoz lernis Esperanton ĉe la fino de la 19-a jc. kaj frue en la 20-a jc. malfermis libro-vendejon en Montevideo, la unuan en Sudameriko dediĉitan al la vendo de Esperantaj libroj kaj periodaĵoj.

En Brazilo, kie Esperanto ĉiam havis vastan sekvantaron kaj ankaŭ ricevis registaran apogon, pluraj nomoj aperas en abonlistoj de periodaĵoj kaj internaciaj adresaroj datitaj antaŭ 1900. En 1899 *Lingvo Internacia*, eldonita en Uppsala, Svedio, havis kiel abonanton d-ron João Antonio de Avellar en Sete Lagoas, ŝtato Minas Gerais. Du jarojn pli frue F. P. Machado Reis en Santos komencis ricevi tiun revuon. Antonio Caetano Coutinho de Azevedo, farmacisto en Pirapetinga, ŝtato Minas Gerais, lernis Esperanton en 1898 kaj en 1905 faris tradukon en la portugalan lingvon de la franca Esperanto-lernolibro de Th. Cart. Cristiano Kraemer, tradukisto kaj ĵurnalisto en Porto Alegre, ŝtato Rio Grande do Sul, estis listigita kiel esperantisto en la jaro 1896. Ĉe proksimume la sama tempo, F. da Silva, loĝanta en la terkultiva kolonio São Feliciano en la distrikto Encruzilhada de Rio Grande do Sul, komencis korespondi en Esperanto kun la rusa pionira esperantisto Kazimir Ostanieviĉ en Peterburgo. La plejmulto da fontoj asertas, ke la unua brazila esperantisto estis d-ro Jácome Martins Baggi de Araujo, ĵuĝisto en Petrópolis, ŝtato Rio-de-Janeiro, kiu ekuzis Esperanton por internacia korespondado en 1896.

Tamen, estis almenaŭ du aliaj esperantistoj en Brazilo antaŭ 1896. Unu estis la ĉeĥo František Lorenc, kiu post portugalligo de sia nomo, estis konata kiel Francisco Valdomiro Lorenz. Post la lernado de Volapuko, Lorenz fariĝis esperantisto en 1887, la jaro de la eldono de la *Unua Libro* de Zamenhof. Li verkis la unuan Esperanto-lernolibron

por ĉeĥoj, publikigitan en 1890. Devigita forlasi sian hejmlandon, tiutempe sub aŭstria regado, pro politikaj kialoj, Lorenz elmigris al Brazilo en 1893 kaj fine ekloĝis en la agrikultura kolonio São Feliciano, jam menciita ĉi-supre. Estante poligloto, Lorenz tradukis poemojn el pli ol 40 lingvoj en Esperanton. Dum longa tempo oni opiniis, ke Lorenz estis la unua eŭropa esperantisto enmigrinta en Brazilon, sed ekaperis nova atestajo, priiraktota ĉi-sube, kiu iom ŝanĝas la historian bildon.

Revenante al Nordameriko, ni trovas la nomojn de du kanadanoj, I. A. kaj I. B. Lalime el Montréal, registritaj kiel esperantistoj ekde 1896. Tamen, estas ĝenerale agnoskita, ke la plej frua kanada esperantisto estis Patro François Xavier Solis, maljuna pastro de la Seminario Saint Hyacinthe apud Montréal, kiu lernis la internacian lingvon en 1895.

En 1899-1900 la mineja termezuristo Wilhelm Heinrich Trompeter, pionira germana esperantisto kaj la dua mecenato de la Esperanto-movado, vojaĝis tra Usono kaj en la ŝtato Vaŝingtono, en Eastsound sur la insulo Orcas, li rendevuis kun alia eŭropa esperantisto, kiu antaŭiĝis al li en Usono. Onidire, Trompeter estis la unua persono, kun kiu Richard Henry Geoghegan parolis Esperante. Geoghegan estis brita filologo de irlandada deveno, kiu specialistiĝis pri orientaj lingvoj, precipe la ĉina, dum li estis studento ĉe la Universitato de Oksfordo. Li estis la unua angleparolanta persono, kiu lernis Esperanton, plej verŝajne en novembro 1887. Li atentigis Zamenhof pri la malbona traduko de la *Unua Libro* en la anglan, farita de Julian Steinhaus, polo el Varsovio. Zamenhof ĉesigis la dissendadon de tiu libro, kaj Geoghegan entreprenis la retradukon, publikigitan en 1889. Li enangligis ankaŭ aliajn Esperantajn publikigaĵojn. En 1891 Geoghegan kun sia vidva patrino kaj gefratoj ekloĝis en Eastsound, Vaŝingtono. Geoghegan iris al Tacoma en 1893 por labori kiel stenografisto kaj definitive transloĝiĝis al Alasko en 1903. Laborante tie kiel tribunala stenografisto, li trovis tempon studi indigenajn lingvojn kaj fariĝis aŭtoritatulo pri la aleuta lingvo.

Ni reiru nun al Brazilo, kie alia dufoja pioniro ekaperis en tiu lando en 1890. Rudolfs Libeks, instruisto el Riga, Latvio, lernis Esperanton en 1889, kaj lia Esperanto-lernolibro, la unua en la latva lingvo, estis eldonita samjare. Libeks elmigris de sia hejmlando al Sudameriko tri jarojn antaŭ ol la ĉeĥo F. V. Lorenz forlasis Eŭropon, tiel forpreninte de tiu ĉi lian antaŭecon. Kiel la unua esperantisto en Brazilo, Libeks ŝajne estis englutita en tiun enorman landon, ĉar estas neniuj cciigoj pri lia agado tie, krom la informo, ke li mortis en 1899.

La persono, kiu nekontesteble meritas la titolon de la unua amerika esperantisto estas Henry Phillips, filo, advokato el Filadelfio, Usono, kaj sekretario de la Amerika Filozofia Societo en la sama urbo. En 1887 la Societo entreprenis ekzamenon de Volapuko, la internacia lingvo de Johann Martin Schleyer, publikigita proksimume unu jardekon antaŭ ol la lingvo de d-ro Zamenhof aperis en sia presita formo. La komitato, kiu estis ŝargita analizi Volapukon, donis malfavoran opinion pri la taŭgeco de tiu lingvo kiel perilo por internacia komunikado kaj starigis principojn, sur kiuj internacia lingvo estas bazenda. Ĉar estis konstatite, ke Esperanto havas trajtojn konformajn al la kriterioj listigitaj en la raporto de la komitato, Henry Phillips tradukis la *Unua Libro*-n de d-ro Zamenhof en la anglan lingvon, kaj ĝi estis publikigita kune kun la komitataj raportoj en Nov-Jorko en 1889. Tiu ĉi historia publikigaĵo sendube estas la unua formala agnosko de la meritoj de Esperanto farita de reputacia scienca organizaĵo. La nomo de Henry Phillips, filo, estas listigita sub n-ro 684 en la unua adresaro de esperantistoj eldonita en 1889. Phillips lernis Esperanton en 1887, la sama jaro, kiam ĝi aperis publike, do li devas esti rigardata kiel la unua persono en la Nova Mondo, kiu interesiĝis pri Esperanto. Lia frua esperantistiĝo estas des pli grava, ĉar per lia verko multaj kleruloj en Ameriko estis informitaj pri la internacia lingvo.

La pra-esperantisto Leo Wiener

Antaŭ nelonge mi malkovris atestajojn pri eŭropa esperantisto — aŭ prefere, pra-esperantisto —, kiu alvenis en Usono kvin jarojn antaŭ ol la Amerika Filozofia Societo komencis sian esploron pri internaciaj lingvoj. Tiu ĉi parto de la historio komenciĝis en Pollando en la urbo Bjalistoko, kie d-ro Zamenhof naskiĝis. Tri jarojn poste, en 1862, alia knabo, Leo Wiener, venis en la mondon. Kvankam pli juna ol Zamenhof, eble la infano Wiener konis lin kaj eĉ ludis kun li.

Post la komenco de sia mezgrada eduko en bjalistoka gimnazio, Zamenhof kun sia familio transloĝiĝis al Varsovio en 1873. Wiener komencis frekventi gimnazion en Minsk, sed ankaŭ li iris al Varsovio por daŭrigi sian lernadon. Tie la du lernejoj ja konatiĝis unu kun la alia, kvankam ili ne estis en la sama gimnazio. Leo Wiener estis unu el la amikoj de Zamenhof, kiu lernis la unuan formon de Esperanto, kiun Zamenhof ellaboris, la lingvon nomatan *Lingwe Uniwersala*. La 17-an de decembro 1878, antaŭ precize 100 jaroj, okazis festeto en la hejmo de la 19-jara Ludoviko. En kunesto kun siaj familianoj kaj ses aŭ sep gimnaziaj kamaradoj, kiuj montris interesigon pri lia internacia lingvo, Zamenhof solenis la «Tagon de Vivigo de la Universala Lingvo». Li deklamis kvarverson, kiu hodiaŭ estas la sola postrestinta teksto en tiu frua dialekto de Espe-

ranto. Jen la originala poemo kun la Esperanta versio tradukita de Zamenhof mem.

Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá.

Malamikeco de la nacioj
Falu, falu, jam tempo estas!
La tuta homaro en familion
Unuigi devas.

La sekvan jaron, la du amikoj estis apartigitaj. Zamenhof iris al Moskvo por komeci siajn medicinajn studojn ĉe la universitato en la rusa ĉefurbo. Unu jaron poste, Leo Wiener enskribiĝis en la medicina fakultato ĉe la Universitato de Varsovio, sed li ne restis tie por doktoriĝi. Sanginte sian profesion celon, li iris al Germanio por studi la inĝenierion ĉe la Politeknika Instituto en Berlino de 1881 ĝis 1882. Pro financaj malfacilaĵoj, Zamenhof reiris al Varsovio en 1881 kaj daŭrigis siajn studojn ĉe la tiea universitato, kie li ricevis sian kuracistan diplomon en 1885. Tiutempe Leo Wiener jam forlasis Eŭropon por iri al Ameriko. Lia origina plano estis fondi utopian komunumon en Centrameriko, sed lia partnero sin retiris, kaj la 20-jara Wiener elŝipiĝis anstataŭe en Nov-Orleano en 1882. Li vagadis tra la suda kaj meza Usono antaŭ ol ekloĝi en la ŝtato Misurio. De 1892 ĝis 1895 li estis sub-profesoro pri ĝermanaj kaj latinidaj lingvoj ĉe la Universitato de Misurio en Columbia. Perdinte sian oficon pro politika nepotismo, Wiener iris al la orienta marbordo de Usono, unue el Bostono, poste al Kembriĝo, Masaĉuseco. En 1896 li estis nomumita docento pri slavaj lingvoj kaj literaturo ĉe la Universitato Harvard. Tie li fondis la unuan universitatan fakon pri la slavistiko en Usono kaj fine atingis la rangon de universitata profesoro.

Leo Wiener estis multsciulo, kies esploroj ne limiĝis je la slava filologio aŭ la hindeŭropa lingvistiko. Same kiel Zamenhof, li interesiĝis ankaŭ pri la jida lingvo kaj literaturo. Li kontribuis etimologiojn al la plej granda usona vortaro, skribis pri fruaj vojaĝoj de Afriko al Ameriko, studis la originon de la majaŭoj kaj meksikanoj, okupiĝis pri ciganoj, araba-gota kulturo kaj mezepokaj ĝermanaj leĝoj, kaj publikigis ankaŭ artikolojn pri la matematiko. Sed tri jardekojn post kiam li lernis *Lingwe-Universala*-n, lia entuziasmo por internaciaj lingvoj malkreskis.

En 1907-1908, Elmond Privat, la fama svisa esperantisto, faris prelegvojaĝon en Usono por informi pri Esperanto kaj ankaŭ instrui la lingvon. La 18-jara junulo intence iris al la Universitato Harvard por viziti la filozofon William James. En sia priskribo de la intervjuo, Privat ne mencias Leo Wiener. Ĉu li sciis, ke tiu pra-esperantisto oficis ĉe la universitato? Verŝajne ne. Eĉ antaŭ ol Privat estis en Harvard, Wilhelm Ostwald, menciita ĉe la komenco de tiu ĉi artikolo, pasigis unu jaron ĉe la sama universitato, sed ne estas indikoj pri kontakto inter li kaj Leo Wiener.

Malgraŭ la fakto, ke Leo Wiener laboris sur tiom da diversaj kleraj stud-terenoj, li estis eklipsita de sia filo, Norbert Wiener, la patro de la kibernetiko, kiu fariĝis la plej elstara matematikisto en Ameriko en la 20-a jc. Leo Wiener fariĝis forgesita homo en Esperantujo. Lia nomo aperas nek en *Enciklopedio de Esperanto*, nek en la biografioj pri D-ro Zamenhof, kiujn mi povis konsulti, nek en la kompilaĵoj de fruaj dokumentoj de la Esperanto-movado. Marjorie Boulton kaj Maria Ziolkowska, priskribante la kreadon de *Lingwe Uniwersala*, diras nenion pri Leo Wiener, kvankam ili mencias la nomon de alia lerneja kamarado de la juna Zamenhof, Aleksandro Waldenberg. Espereble la nova eldono de *Enciklopedio de Esperanto* ne forgesos pri la pra-esperantisto Leo Wiener, kiu, se li ne estis la unua esperantisto en Ameriko, ja estis la unua zamenhofano tie.

Konsultita literaturo

BOULTON, Marjorie.

1962. *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto*. La Laguna, Hispanio.

COURTINAT, Léon.

1964-1966. *Historio de Esperanto*. 3 volumoj. Bellerive-sur-Allier, Francio.

DREZEN, Ernest.

1931. *Historio de la mondolingvo*. Leipzig.

1967. /fotorepreso/ Oosaka.

GOMES BRAGA, Ismael.

1965. *Veterano?* 2-a eldono. Rio de Janeiro.

HOLZHAUS, Adolf.

1971. *Wilhelm Heinrich Trompeter*. Tel Aviv.

HOLZHAUS, Adolf.

1969. *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. Helsinki.

JESPERSEN, Otto.

1977. «Meine Arbeit für eine internationale Sprache». Tradukita el Novial de Kurt Neumann. *Arbeitsmaterial Nr. 7*, Fachgruppe Interlinguistik/Esperantologie, Zentraler Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR. Berlin.

JOSSINET, Roland.

1960. «Biografiaj informoj pri D-ro L. L. Zamenhof: lia vivo — liaj vojaĝoj». En *Memorlibro*. Londono.

- KOKENY, Lajos - BLEIER, Vilmos /redaktoroj/
1933-1934. *Enciklopedio de Esperanto*. 2 volumoj. Budapeŝt.
- LAPENNA, Ivo - LINS, Ulrich - CARLEVARO, Tazio.
1974. *Esperanto en perspektivo*. London, Rotterdam.
- «MINUTE ON THE LIFE AND SERVICES OF PROFESSOR LEO WIENER.»
1940. *Harvard University Gazette*, March, 9, 1940, p. 123.
- POSTNIKOV, Feodor. /redaktoro/
1947. *Kiu estas kiu inter Nord-Amerikaj Esperantistoj*. 2-a eldono - 1947-48. Little Rock, Arkansas. Usono.
- PRIVAT, Edmond.
1927. *Historio de la lingvo Esperanto*. La Movado - 1900-1927. Leipzig.
- PRIVAT, Edmond.
1963. *Aventuroj de pioniro*. La Laguna. Hispanio.
- PRIVAT, Edmond.
1967. *Vivo de Zamenhof*. 5-a eldono. Chorleywood, Rickmansworth, Herts., Anglio.
- RICHARDSON, David.
1974. «Richard Henry Geoghegan». *Esperanto*, novembro, n-ro 11 /827/, p. 188-189.
- STOJAN, Petro.
1929. *Bibliografio de Internacia Lingvo*. Genève.
1973. /fotorepreso/ Hildesheim.
- WIENER, Norbert.
1964. *Ex-prodigy: my childhood and youth*. Cambridge, Mass.
- ZAMENHOFF, L. L.
1986. «Eltilo el privata letero al s-ro B.» /N. Borovko/ *Lingvo Internacia*, vol. 1, n-ro 6-7, p. 115-119.
- ZIOLKOWSKA, Maria.
1959. *Doktoro Esperanto*. Tradukita de Isaj Dratwer. Warszawa.

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. Ivo Lapenna
N-ro 16

26 DELEGITOJ DE UEA REGISTRATAJ ĈE POLITIKA POLICO

Anonima esperantisto el Ĉeĥoslovakio sendis al la redaktoro de tiu ĉi rubriko parton de cirkulero, kiun en oktobro pasintjara Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj s-ro L. Rýznar, ĉefdelegito de UEA, poŝtkesto 21 - 568 11 Svitavy, sendis al ĉiuj membroj de UEA en tiu lando. El la cirkulero vidiĝas, ke ĉiuj delegitoj, fakdelegitoj, vicdelegitoj kaj junularaj delegitoj de UEA en Ĉeĥoslovakio devas esti registritaj ĉe politika polico, kio konfirmas la analizon pri la stato de la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio, donitan en ĉap. 2.2 de *Hamburgo en Retrospektivo*. Jen la teksto de la koncerna parto de la menciita cirkulero:

«*La delegita reto*: Dum la lasta tempo ekstagnis la kompletigo de la delegita reto. Tion kaŭzis la fakto, ke ĉiu eksterlanda funkciulo devas esti registrita laŭ la preskriboj de nia ŝtato. Tio validas por ĉiuj societoj kaj organizaĵoj, do ankaŭ por la funkciuloj (D, FD, VD, JD), membroj de UEA. Kvankam temas pri afero principe formala, tamen estas necesa plenumo de unu plua demandilo, kiu restas konservita enlande kaj ĉiu intereso pri la funkcio bezonas rekomendon de la loka grupo kaj definitivan aprobon de la Esperanto-Asocio Ĉeĥa aŭ Slovaka. Ni alvokas niajn membrojn en la kat. MA fariĝi speciale delegitoj por sia loko, kaj ĉiu intereso postulu de /la/ ĉefdelegito kompletigan demandilon, se via /lia, ŝia/ intereso pri la funkcio restas. Post tiu klariĝo via sinpropono por fariĝi delegito estos rapide pritraktota (pritraktita), /tiel/ ke via envicigo okazu dum la jaro 1979. La vintra estrarkunsido de CEA okazos komence de la /sen la/ decembro 1978». Subskribitaj L. Rýznar, ĉefdelegito de UEA, kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio. (En rektaj krampoj estas faritaj korektoj de kelkaj el la lingvaj eraroj.)

En la akompana letero, kiun la anonima sendinto adresis al la redaktoro de tiu ĉi rubriko, estas interalie skribite:

«Ĉu fakte niaj du Asocioj (Ĉeĥa kaj Slovaka) estas tute neŭtralaj. Bonvolu, kamarado Křimský, respondi, ĉu ĉiu ano de tiuj du niaj Asocioj povas havi iun funkcion en nia E-Movado? Laŭ miaj informoj ĉiu funkciulo de nia E-Movado (1) devas esti ano de KP Ĉeĥoslovaka; (2) devas esti aprobita de la anoj de la *regiona komitato de la Komunista Partio Ĉeĥoslovaka*, nome de la regiono en kiu tiu ĉi samideano loĝas. Vi skribas, ke temas pri afero principe formala... Ne, tute ne estas formala tiu afero! Ĉiu funkciulo de UEA (1) devas esti aprobita de la KP; (2) estos 'sub lupeo' de la sekreta polico.»

«Pri fundamentaj homaj rajtoj: tiuj viaj vortoj, belegaj, pri la laboro, pri sekureco ktp. en Ĉeĥoslovakio (ĉi tie la sendinto aludas al la artikolo de Z. Křimský «Diskuti sen Mistifikoj», koncize pritraktita en ero 21 sur p. 141 de *Horizonto*, rim. de la red.). Ni ĉeĥoslovakianoj tre bone konas ilin: tiuj estas tute demagogiaj vortoj de nia 'glora'

KPC same tiel, kiel demagogiaj estas la vortoj pri PACO: tiuj, kiuj tiel multe kaj ofte uzadas tiun vere belan vorton PACO, maksimume produktadas armilojn, maksimume preparas mondmiliton! En tia ŝtato ni vivas kaj ni ĉion vidas! Estas tute demagogiaj viaj vortoj, k-do Křimský, ke 'ni povas viziti fremdajn landojn, ankaŭ okcidentajn'. Estas policaj, labordonantaj organoj, ktp.! Ĉu ankaŭ nun vi povas babiladi pri HOMAJ RAJTOJ en nia lando Ĉeĥoslovakio? Ekde la 1-a de januaro 1979 ni, Ĉeĥoslovakianoj, ne povos libere vojaĝadi eĉ en nian najbaran, socialisman landon, en Hungarujon. Ĉu mataj homaj rajtoj en Ĉeĥoslovakio?

Mi finas mian leteron, kara kaj por mi nekonata, sed estimata sinjoro Prof. Lapen-tigon. Eble iam mi povos vin persone vidi kaj mi esperas, ke vi bonvenigos nian renkon-tigon. Sed tio por mi estas nur utopia revo!

Mi tute ne komprenas la politikon de la Estraro de UEA, sed ŝajnas al mi ke ili fine malgajnos, se temas pri la politiko rilate al la tiel nomataj socialismaj landoj. Plej sin-cere via» (subskribo nelegebla).

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 2.2 kaj aliajn partojn de *Hamburgo en Retrospektivo*, kiu siavice kompletigas la verkon *Esperanto en Perspektivo*.

27 BRITA ESPERANTO-ASOCIO (BEA) CELEBRIS LA CENTJARAN DATREVENON DE ESPERANTO

En Britio okazis preskaŭ nekredebla fuŝaĵo. Komence de decembro 1978 subite aperis en diversaj londonaj taggazetoj, eble ankaŭ en aliaj, artikoloj kaj informoj, laŭ kiuj la 5-an de decembro 1978 estis la 100-jara datreveno de Esperanto. Ankaŭ la brita radio kaj televido (BBC) menciis tiun «datrevenon». Laŭ poŝtkarto de s-ro Stuart Campbell de la 14-a de decembro 1978, «la eraro devenis de gazetinformo, kiun eldonis la Brita Espe-ranto-Asocio». Li aldonis: «Mi tute ne komprenas ĝian malsaĝecon».

Kvankam en la televido estis sufiĉe kontentiga programero pri tiu neekzistanta «da-treveno», tamen en la gazetoj aperis multaj misinformoj kaj primokoj. En la mondfama *The Observer* estis preskaŭ tiom da eraroj pri faktoj, eĉ insultoj, kiom da asertoj. La redaktoro de tiu ĉi rubriko reagis per letero, el kiu vidiĝas la karaktero de la eraroj sur kelkaj ekzemploj. Jen la Esperanto-traduko de la menciita letero de la 11-a de de-cembro 1978:

«En la artikolo de Patrick O'Donovan '100 Jaroj da Honorinda Malsukceso' troviĝas preskaŭ tiom da eraroj kaj malprecizajoj, kiom da asertoj.»

«Li skribis ke 'Esperanto Fariĝis 100 Jarojn aĝa en la pasinta semajno', kio ne estas ĝusta, sed jam en la sekvanta alineo li korekte informis, ke la unua gramatiko de tiu ĉi lingvo estis publikigita en 1887. Ĉu li ne interŝanĝis 1978 kaj 1987, aŭ estis tro mal-facile por li aldoni 100 al 1887? Li skribis pri 'la trankvila datreveno de Esperanto' kaj moke aldonis, ke ĝia 'centjaro pasis preskaŭ same nerimarkita, kiel paŭpera (malriĉu-la) rekviemo'. Kompreneble, tiu ĉi neekzistanta 'centjaro' pasis nerimarkite, ĉar nenie en la mondo, kun la escepto de tiu ĉi lando, kiu ajn venis al la ideo celebri centjaran datrevenon naŭ jarojn anticipe. La lingvo ne estis 'inventita de iu D-ro L. L. Zamenhof', sed iniciatita de D-ro L. L. Zamenhof, kiu en 1959 estis deklarita de Unesko 'unu el la grandaj personecoj de la homaro'. Tiu ĉi lingvo ne estis 'nomata Dotter E', sed 'Inter-nacia Lingvo'. La libreto enhavanta ĝian fundamentan gramatikon kaj bazan radikaron estis publikigita sub la pseŭdonimo de la aŭtoro 'Doktoro Esperanto'. Nur poste la 'Internacia Lingvo' de Zamenhof fariĝis konata ankaŭ kiel 'Esperanto', neniam 'Dotter E', kiel vi povas facile kontroli en kiu ajn enciklopedio. La sidejo de Universala Esperanto-Asocio — ne de Esperanto, kompreneble, — estas en Rotterdam, Nederlando, kaj ne en 140, Holland Park Avenue, Londono...»

«Simile preskaŭ en ĉiu frazo de tiu nekredeble misinforma kaj eĉ insulta artikolo ('manio', 'etikedo de frenezeto', k.s.), kiu montras ne 'la malsukceson de Esperanto' (ĝi estas disvastigita kaj sukcese uzata en la mondo), sed ignoron kaj antaŭjuĝojn de O'Donovan.»

La supra letero ne estis publikigita en *The Observer*, sed la redakcio tamen publi-kigis mallongan, trafan korekton de Stuart Cambell en la n-ro de 17.12.78. Aliflanke, *The Guardian* de 13.12.78 kaj *Daily Telegraph* de 15.12.78 publikigis koncizajn korektojn senditajn de la redaktoro de tiu ĉi rubriko.

Estas pli ol bedaŭrinde, ke BEA per sia komuniko kaŭzis tiun kulturalan skandalon. Ŝajnas, ke ĝi tute arbitre decidis preni la 5-an de decembro 1978 kiel la tagon de «nas-kiĝo de Esperanto». Kiel konate, tio estis la tago, kiam la juna Ludoviko havis festeton en la hejmo de siaj gepatroj por anonci la praprojekton de la posta Internacia Lingvo. publikigita en 1887. Sed BEA eraris eĉ rilate tiun daton, ĉar la 5-an de decembro okazis la festeto laŭ la malnova rusa kalendaro, do ne la 5-an, sed la 12-an de decembro laŭ nia, nun ankaŭ rusa kalendaro. Espereble ĝis 1987 UEA retrovos sin mem kaj tiam en la tuta mondo oni povos digne kaj adekvate celebri la 100-jaran datrevenon de Esperanto kiel unu el la plej gravaj eventoj en la kultura historio de la homaro.



“Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo.”

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

FEDON (La Morto en la Filozofio kaj la Scienco), Platon. Trad. Sokratis Sakellaropoulos, Ateno 1978, 160 paĝoj.

Por la unua fojo venis al mi por recenzi, libro el Grekujo. La aŭtoro estas aktiva membro de nia Neŭtrala Movado, kaj la temo ŝvebas super la materiecaj ĉiutagaĵoj.

Kio estas la Morto, kio estas la animo, ĉu nia vivado ĉesas kun la korpo, sur la Tero, aŭ male, daŭras plu senkorpe, ie? Sed kie? Ĉu la animoj kreĝas kun la korpoj aŭ jam ekzistis antaŭe, ĉu de dia deveno, ĉu nur homaj aŭ ĝenerale animalaj?

Tiuj kaj aliaj similaj estis ŝatataj temoj de antikvaj filozofoj. S-ro Sokratis Sakellaropoulos havigas al ni en Esperanto la rakonton de FEDON pri la ekzekuto de Sokrato, la ideojn de Platono, la dialogon de Sokrato kun Kevis, Simias, Eŭkratato, Kriton, Apolodoro... en la lastaj horoj de la kondamnita filozofo.

Kiel kredanto, la aŭtoro citas spiritismajn fenomenojn i.a. fantomaperojn, kiuj okazis per famaj mediumoj en tranco. Kvakam la aŭtoro konsideras veraj tiujn fenomenojn, li saĝe esprimas sian dubemon citante el la libro «Nia Hejmo» tiun paradoksaĵon, «ke en la regno de l'spirittoj oni transportiĝas per... aŭtobusoj!».

Kun absoluta respekto al ĉies opinio kaj kredo mi avertas, ke renomaj sciencistoj estis dupe trompitaĵoj de ne kleraj mediumoj kaj iliaj prezentantoj. La fama hispana astronomo Josep Comas i Solà, direktoro de l' Observatorio «FABRA» en Barcelono, antaŭ ĉ. 60 jaroj konsentis okazigi spiritismajn seancojn en sia hejmo. Akompanis lin kun aliaj, la tiama direktoro de «La Vanguardia», ĉefa ĵurnalo en Hispanujo. Dum seanco, preskaŭ en mallumo, aperis al ili fantomo, kiu eĉ donis la manon (do, materiecan). Supozante ke ĝi reaperos en proksima seanco, ili tiam ŝmiris al si la manojn per metilbluo, antaŭ ol komenci. Nu, la fantomo reaperis, redonis la manon, ili premis ĝin amike... kaj fininte, jam sur la sojlo, ili subite ekprenis la brakon de l' mediumo, kaj la bluo estis tie, perfide, sur ties mano! Tial S-ro Comas (1) neniam volis subskribi priateston (Tia estis la celo de

la seancoj). Malgraŭ tio, nia klarega astronomo «kredetis» je la transvido de tiu «divenistino» nomata Mariscal, kiu en teatroj miregigis per siaj ĝustaj respondoj al demandoj de ŝia komplica kunludanto staranta partere, inter la spektantoj. Kun okuloj severe vinditaj ŝi respondis fulmrapiĝe kvazaŭ vidante en suna helo, kaj S-ro Comas, kiu i.a. inventis spektroskopon procedon por determini la stelkurentojn kaj eltrovis dek-unu pladedetojn... ne suspektis, ke ŝiaj respondoj jam estis ruze entenataj aŭ indikitaj en la demandmaniero!

Kaj la grava Profesoro Ch. Richet? Mistifikita en Alĝero, Villa Carmen, fare de Marta Béraud, mediumo de S-ro Bisson, per la fantomo B. B. D-ro Gustave Le Bon asertis, ke la konata mediumo Eusapia Palladino, kiu per sia fingrofluido movis distance leterpesilon, estis plurfoje surprizita en sia truko: ŝi movis la teleteron per haro tenata de la fingroj (2).

En la dua parto la aŭtoro prezentas dek-unu resumitajn prelegojn pri la Morto, faritajn de profesoroj kaj akademianoj diverslandaj. Sekvas Epilogo de l' aŭtoro, en kies antaŭlasta paragrafo li diras: «Tamen, nenio estas tute certa. Novaj demandoj kaj miroj sinsekvas, se oni volas plu iri en la esploro de la sekretoj, kiujn kaŝas la senfina Universo...».

La stilo de l' dialogo ne respondas al moderna sintakso; sed pri tio la aŭtoro avertas en paĝo deka.

La lingvo ĝenerale estas bona, malgraŭ kelkaj makuletoj, kiujn ĉiu uzanto faras, eviteblaj per reviziado fare de alilanda klerulo: Respiro, Seolo, Drinki, Muzikala, Disĉiplo, Evoluata, Likvidaĵo, estas: Spiri, Seolo, Trinki (Sokrato trinkis venenon) Muzika, Disĉiplo, Evoluinta, Likvaĵo.

Kiel la aktiva, ankaŭ la pasiva gerundio finiĝas per E; sekve la frazo (pĝ. 148) «estos nature, ke li staros sur la tero putriginta, plenuminta sian destinton» devas esti: «estos nature, ke li staros sur la tero putrinte, plenuminte sian destinton», ĉar ne la tero, sed li, putros. En pĝ. 151 mi trovis frazon kurioze ne klaran pro maldistingo de participoj kaj gerundioj: «Ĉu okazis al vi, ke vi iam vidis vian korpon mem ekster ĝi kvazaŭ starante rektakorpe

apud via lito kaj vidante vin mem kuŝanta aŭ kvazaŭ naĝante en la aero apud via korpo?». Komparu: «Ĉu okazis al vi, ke vi iam vidis vian korpon mem ekster ĝi kvazaŭ staranta rektakorpe apud via lito kaj vi vidis vin mem kuŝanta aŭ kvazaŭ naĝanta en la aero apud via korpo?».

La libro estas tre interesa, kaj mi povas nur danki kaj gratuli S-ron Sakellaropoulos pro lia merita laboro provizi nian literaturon per la rezonaĵoj iam tiel karaj al antikvaj helenaj filozofoj.

Salvador Gumà

(1) José Comas Solà, «El espiritismo delante de la Ciencia».

(2) Prof. Dicksonn, «La Vérité sur le Spiritisme», 1917.

KOLEKTADO - Esperanto-bulteno. Ni ricevis numeron 0, Novembro 1978 de tiu ĉi 8-paĝa bulteno. Laŭ tiu ĉi numero ĝi estas tre interesa por kolektantoj kaj por esperantistoj ĝenerale; ĝi estas bone prezentita kun interesaj sugestoj kaj informoj.

Adreso: **KOLEKTADO** - Esperanto-bulteno, Str. Forn, 21 - MOYA (Barcelona), Hispanujo.

TRA LA ESPERANTO GAZETARO

En l'esperanto (1978/6 p. 9) pri la fonema aspekto de la propraj nomoj elstaras artikolo de Aldo de' Giorgi «Denove pri onomastiko, kiu per trafaj argumentoj respondas al la antaŭaj asertoj de Renato Corsetti, ke «lingvo estas io antaŭ ĉio parola». La verkinto atentigas ĉefe, ke «regula transskribado nur tre relative helpas kaj tre ofte naskas miskomprenojn kaj fuŝaĵojn... Ĉu pli ĝene cerbumi kiel prononciĝas Sándor Fenyevesy kaj Lerczy Gredinski, aŭ ŝviti por rekoni, kiuj homoj kaŝiĝas en la transskriboj aci, fermas, ĉoliĉ, albo, k.s.?». Ja koncerne proprajn nomojn ĉu la memoro kutime ne konservas bildon pli skriban ol parolan?

En NOV-ZELANDA ESPERANTISTO (n.º 402 - 1978/5) estas legeble el la rubriko «ĉu vi legis...?» (cetere kun la subskribo «Anonima») jenan rimarkon: «Kiel kutime **HORIZONTO** estas leginda kaj valora gazeto. Tamen pretendante esti la voĉo de Esperanto-Neŭtraleco, ĝi samtempe trumpetas postulojn por la liberigo de esperantisto Jurij Belov en Sovetunio kaj atakas UEA'n pro ties prisilento koncerne tiun aferon (marto-aprilo 1978). Nu mi tute ne subtenas la tenadon de iu ajn en mensa hospitalo nur pro 'kontraŭŝtata kritiko', sed ŝajnas al mi ke neniuj organizajo, malpleje esperanta, povas publike interveni en tiaj cirkonstancoj sen kompromiti sian neŭtralecon». Ĉu ne stranga koncepto de neŭtraleco la sinteno, kiu lasus sen reago aresti kaj torturi geesperantistojn, kiel okazis antaŭ la milito kaj en Germanio kaj en Sovet-Unio? Ĉu neŭtraleco aŭ indiferenteco pro timo kompromitiĝi? Ja en simple kriminala kodo de kelkaj landoj ekzistas eĉ la kulpiga nocio de «ne-helpado al persono en danĝero de morto»! La interveno malpli rilatas al la «kontraŭŝtata kritiko», kies takso restas delikata, ol temas ja pri la «tenado en mensa hospitalo», kiu konsistigas nerefuteblan atencon al la Homaj Rajtoj, kies respekton UEA mem eĉ statute deklaras por sia laboro «esenca kondiĉo» (art. 4).

En INTERNACIA FERVOJISTO (sept.-okt. 1978, n.º 5) la prezidanto de la Internacia Fesvojista Esperanto-Federacio J. Giessner sur la paĝo 65 skribas interalie: «Ni plenkore gratulas al prof. Lapenna pro lia ora jubileo kaj deziras al li, ke ankoraŭ longe lia sanstato permesos al li doni siajn fortojn ankaŭ estontece por sia idealo». Jen deziro, kiu dependas malpli de lia sanstato ol de tiu de la Esperanto-Movado! En la sama numero kiel en «**ESPERANTO**» de UEA aperis anonco pri la «ekster-ordinara traktajo de Albert Lienhardt». Certe ja «ekster-ordinara» estas tiu traktajo pri «**OPTIMALA ORTOGRAFO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO**», unu plia reformo, kiu provas atenci la ĝisnunan pli-olnaŭdek-jaran tradicion de la lingvo! Ĉu ne mirkonsterne, ke I FEF kaj UEA subtenas tian entreprenon?

J. T.

LA INGENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA

Tiu ĉi grava verko aperis en eldono «Fundación Esperanto» de Hispana Esperanto-Federacio (Eldona Fakto) Zaragoza. 820 paĝoj, formato 17,5 x 25 cm, ilustrita, bindita. Prezo: 2.500 pesetoj plus 10 % por sendokostoj.

Havebla ĉe F. E. Sekr. Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza-1, Hispanujo, aŭ ĉe via libroservo.



MALLONGE

ESPERANTO KAJ SPORTO

De antaŭ pli ol unu jaro, ekzistas en Málaga, Hispanujo, teamo de amatoraj biciklistoj sub la nomo **ESPERANTO**. Ĝi estis fondita de nia samideano Fernando Prieto, kiu aktive praktikas kaj Esperanton kaj tiun sporton. La teamo ĝuas grandan simpatian, ne nur en la provinco Málaga, sed ankaŭ en la ceteraj provincoj de Andaluzio, kie la teamo partoprenas en pluraj konkuradoj.

Ĝis nun, nur unu el la biciklistoj estas esperantisto, verŝajne, kiam ili eniros en la profesion kampon, ĉiu el ili parolos la Internacian Lingvon.

GRAVA PORESPERANTA LABORO EN LA LABORA UNIVERSITATO DE CHESTE

Pasintjare, mi informis pri la Esperanto-kurso en la Labora Universitato de Cheste, Hispanujo. Denove en oktobro, je la komencigo de la lernojar 1978/79, estis inaŭgurita kurso de Esperanto en tiu Oficiala Centro. Post la pasintjara sukceso, tri estas la kursoj, kiujn nia samideano s-ro Félix Navarro, Nacia Instruisto, Prezidanto de la Valencia Esperanto-Grupo, gvidas, du tagojn semajne dum tri sinsekvaj horoj, de la 3-a ĝis la 6-a posttagmeze.

Plie, nia senlaca samideano, de la 2-a de oktobro gvidas du aliajn kursojn en la Valencia Esperanto-Grupo, tri tagojn semajne, de la 7-a ĝis la 9-a vespere.

Cu vi povas helpi nian valencian samideanon? Kiel li diras, li bezonas grandan kvanton da gekorespondantoj por siaj centoj da gelernantoj. Plej eble, en viaj Esperanto-Grupoj ekzistas esperantistoj, kiuj volonte interkorespondus kun ili. Jen la adreso:

S-ro Félix NAVARRO, str. Calixto III, 36, VALENCIA-8. Hispanujo.

Pasintjare mi diris: «De ĉiam, la valencia regiono estis kaj restas bona grundo por la Internacia Lingvo. Sekve, tiu nova kurso estas esperplena promeso por daŭra vivo de Esperanto». Nun mi povas aldoni: Tiu promeso fariĝas realaĵo.

DIVERSAJ RICEVITAJ BROSUROJ

Lastatempe ni ricevis jenajn broŝurojn:

SSRT per sia ok-paĝa, ilustrita broŝuro-programo 1979, informas pri la diversaj programoj de 5/11/78 ĝis 3/11/79. Ĉar la broŝuro estas eldonita en nacia lingvo, mi dankas ke oni sendis ĝin al ni en la hispana. **ATENTU:** De la 5-a novembro 1978 la internacia servo de la kurtunda svisa Radio, nomiĝas «Svisa Radio Internacia».

La broŝuro 1/1979 de Radio Vatikana donas al ni jenan informon: «**ESPERANTA PROGRAMO**».

Por kontentigi la insistajn petojn pri spaco pli longa por elsendoj en Esperanto, ekde la 4-a de januaro 1979 surondiĝos ĉiujare nova programo, kiu entenos raportojn pri la papaj aŭdiencoj kaj, ĝenerale, informojn pri la katolika Eklezio. — **AŬSKULTU NIN ĈIUJARE JE H. 7,15 CET**».

Eldonita de la Turisma Oficejo en **NANCIO**, aperis interesa faldfolia prospekto pri tiu historia kaj belarta centro, ĉefurbo de Loreno. Estas tre utilaj la mapoj de la urbo kaj la informoj pri la diversaj vidindaĵoj notitaj sur ĝi. La prospekto estas eldonita en Esperanto, ĝi estas alloga invito por viziti tiun belan urbon. Por ricevi la prospekton, oni sin turnu al: Turisma Oficejo - 14, Place Stanislas, F-54000 **NANCY**, Francujo.

STUTTGART. Plurkolora, faldformata turisma prospekto aperis en Esperanto, eldonita de la Turisma Oficejo en la metropolo de Sudokcident-Germanujo. La prospekto estas bele ilustrita kaj tre interesa laŭ informoj. Vi povas ricevi ĝin ĉe: «**VERKEHR-SAMT**», poŝtfako 870, D-7000 **STUTTGART**, Germanujo FR.

Ankaŭ eldonita de la Turisma Oficejo en **KOLONJO** (Germanujo), aperis en Esperanto, 16-paĝa turisma broŝuro plurkolora, riĉe ilustrita pri tiu 2000-jara urbo. Tre interesaj estas la informoj donitaj pri historio, arto, moroj, kaj ĝeneralaj informoj. Oni povas ĝin ricevi ĉe: Turisma Oficejo, **KÖLN**, Germanujo FR.

GLUMARKOJ

Sendita de Esperanto-Gruppe Oberkirch e.V., ni ricevis bela, dukolora glumarko el plastajo en formato 11 × 8 cm. pri la urbo OBERKIRCH en la NIGRA ARBARO, F.R.G.; uzebla ankaŭ por aŭtomobilo. Sur ĝi oni indikas la ekziston de Esperanto-strato kaj stigmatumarko estas havebla kontraŭ 2 respondkuponoj ĉe Esperanto-Grupo Oberkirch, Lohmühlweg 1, OBERKIRCH, Germanujo FR.

Eldonita de Grupo Esperanto de Málaga (Hispanujo), aperis bela gluafişeto el plastajo en formato 10 × 7 cm., uzebla ankaŭ por aŭtomobiloj, kiel informilo pri Esperanto kaj pri la ekzisto de esperantistoj en tiu bela urbo de la suda Hispanujo. Sur ĝi aperas la Esperanto-flago kaj la vorto Esperanto. Aldone, frazo pri la Internacia Lingvo en hispana lingvo. Informoj: Grupo Esperanto, Pasillo Atocha, 3, MALAGA, Hispanujo.

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ - 1979

19-a ALVOKO

Dezirante okazigi plue la glorajn INTERNACIAJN FLORAJN LUDOJN, kiuj tiel sole ne okazadis 18-foje en diversaj urboj de Katalunujo, la Kataluna Kunordiga Komitato de la Hispana Esperanto-Federacio invitas la esperantistajn poetojn kaj prozistojn ĉiulandajn konkurse konkuri per siaj verkoj en tiu tradicia Beleta Trobadora Festo kiu celebrigos en la kadro de la 21-a Kataluna Esperantista Renkontiĝo.

Estos aljuĝitaj la jenaj PREMIOJ:

POEZIA BRANĈO

- 1.— *NATURA FLORO*, al plej bona ama poemo. (Maksimume 80-versa.)
- 2.— *JASMENO*, al la plej bona priesperantisma poemo. (Maksimume 80-versa.)
- 3.— *VIOLO*, al la plej bona humanisma aŭ etika poemo. (Maksimume 80-versa.)

PROZA BRANĈO

PREMIO al plej bona novelo. (Maksimume 2000-2500 vorta.)

TRADUKA BRANĈO

Traduki el la kataluna la noveleto *«L'home de la pipa»*, kies tekston havigos al ĉiu petanto S-ro Salvador ARAGAY, str. Bassegoda, 40, 3-l. BARCELONA-28, kontraŭ poŝtafranko.

La Juĝa Konsistorio aljuĝos, se eble, subpremiojn.
Ĉiu konkursanto bonvolu priatenti la jenan.

REGULARON

- 1.— La verkojn oni sendu, po 4 ekzempleroj nepre tajpitaj je duoble interspaco, nur ĝis la 15-a de julio 1979-a, laŭ la poŝtstampo, al jenaj nomo kaj adreso de la Sekretario: Gabriel MORA i ARANA, str. Carrió, 5, 4. MANRESA (Barcelona). Hispanujo.
- 2.— *Ne rajtas konkursi* tiuj verkoj antaŭe premiitaj aŭ publikigitaj.
- 3.— La aŭtoroj ne devas subskribi siajn konkursaĵojn, sed, krom la titolo, ili devas skribi specifan moton aŭ pseŭdonimon.
Ili enmetu slipon kun siaj nomo kaj adreso en apartan fermitan koverton sur kiu estu skribita la titolo, moto aŭ pseŭdonimo, kaj la elektita branĉo.
- 4.— Kvankam oni devas konsideri ke ĉiu aljuĝota Premio estos, esence, nur honora, ĉiu gajninto ricevos, krom Diplomo, valoran esperantan libron aŭ mondonacon, laŭ ebleco.
- 5.— La Sekretario antaŭsciigos al la jus premiitoj la Verdikton por ke ili povu ĉeesti la Feston aŭ elekti siajn anstataŭantojn (precipe, la gajninto de la Natura Floro, kiu simbole oferdonos ĝin al la Reĝino de l' Poetoj, kaj ŝin akompanos ĝis la trono).
- 6.— La Organiza Komitato rezervas al si la rajton, dum unu jaro, publikigi la premiitajn verkojn.

Sabadell, la 15-an de decembro 1978-a.

IV^a INTERNACIA KONFERENCO DE NEM

Cu vi deziras aŭskulti dum viaj kunvenoj, la prelegojn pri la ĉeftemoj de la IV^a Internacia Konferenco de NEM, okazinta en Jaca (Hispanujo)?

La Administracio de «Horizonto» prizorgas kopiojn. Prezo po kaseto: 300 ptoj.
Informas: Inés Gastón. P.^o Marina Moreno, 35, 4.^o dcha. Zaragoza-1 (Hispanujo).

V-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Okazonta en Ateno, Grekujo, de la 8-a ĝis la 15-a de septembro 1979

Korespondadreso:
Sino Adda Sakellariopoulou
Sokratous 48, Omonia, ATHENO (101)
Grekujo

Konferencejo:
Universitata Domo de la Nacia Organizo
Reĝo Paŭlo

ĈEFTEMO DE LA KONFERENCO

«Instruado de la Internacia Lingvo Esperanto (lerneja kaj eksterlerneja) kun aparta konsidero al la situacio en Eŭropo.»

La ĉeftemo estos pritraktita en formo de prelegoj kun postaj diskutoj. Estas antaŭviditaj 4-5 prelegoj de kompetentaj specialistoj.

Aldone al la ĉeftemo, la Konferenco pritraktos nombron da aktualaj demandoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

Dum la Konferenco okazos ankaŭ kunveno de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kaj ev. de aliaj fakaj organizaĵoj.

La Organiza Komitato preparas aron da interesaj kulturaj aranĝoj, ekskursoj kaj distraĵoj.



Agia Theodori, preĝejo II jarcento.

ATENO

Ateno estas unu el la plej interesaj urboj, kiujn mi konas. Nuntempe, ĝi estas granda, moderna urbo, kies konstruaĵoj, feliĉe, ne estas tro altaj. En ĝia arkitekturo distingiĝas tri periodoj klare difinitaj: la antikva, la bizanca kaj la moderna; plej interesa, sendube, estas la antikva.

La malnova palaco de la reĝo Othon, nuntempe Parlamentejo, estas impona konstruaĵo, kiu dominas la placon Sintagma (Konstitucio), centro de la urbo.

La Konferencejo estas moderna konstruaĵo tre bone lokita kaj tre bone komunikita kun la centro de la urbo.

ATENTU! Frua aliĝo al la Konferenco estos grava helpo por la Organiza Komitato.